

## **Antologio XXVII**

### **Edmond Privat**

Profesoro pri anglaj lingvoj kaj literaturo en la neŭŝatela universitato

### **Federala sperto: Svisa sperto (1958)**

Federala sperto. Studo pri du sukcesoj kaj unu malsukceso

#### *Enkonduko:*

Kiel patrioto ĝeneva kaj svisa Edmond Privat (1889-1962) admiris la federalan sistemon de ŝtatoj kiel Usono kaj Svislando. Ĉi tiun politikan sistemon li konsideris kiel la plej taŭgan por landoj, en kiuj kune vivas diversaj gentoj. Privat bone konis la historion de Ameriko, Eŭropo, de Usono, Svislando, Francio, Anglio, Orienta Eŭropo, kaj li ŝatis kompari la diversajn historiojn kaj politikajn sistemojn. Privat vivis en tempo, kiam Usono jam sukcese elprovis la federalan sistemon, kiam Svislando staris meze en la aplikado de la federalismo, kaj kiam Ligo de Nacioj en 1919/20 en Ĝenevo estis fondita. Komparinte la tri eksperimentojn de federalismo, Privat venis al la konkludo, ke la usona kaj la svisa modeloj sukcesis, dum Ligo de Nacioj fiaskis aŭ devis fiaski, ĉar ĝi ne sincere aplikis la federalismon. Pri tiuj problemoj li decidis verki komparan studon, unue en la franca, poste en Eo – kaj tiel ekestis la libro sub la titolo *Federala sperto. Studo pri du sukcesoj kaj unu malsukceso. Komapro inter: Unuigitaj Ŝtatoj Amerikaj, Svisa Konfederacio, Ligo de Nacioj*. La libron eldonis Universala Ligo en Hago en la jaro 1958.

Pri la valoro de sperto Privat skribis en la enkonduko al la libro jenajn frazojn:

„Ke la homaro estas ankoraŭ tre infana, tion pruvas la fakto, ke en ĝia vivo nur malgrandan rolon ludas la sperto. Anstataŭ lerni el la pasintaj malfeliĉoj por eviti la samajn erarojn centfoje ripetitajn, ĝi emas forgesi tion, kion la prauloj suferis, aŭ nur heredi la timojn kaj la blindan rifuzon ekprovi pli taŭgan vojon. El la malsukcesoj oni ĝenerale konkludas al senutila pesimismo, dum ili havigas la plej efikan instruilon pri eraroj faritaj kaj eviteblaj. Tio estas antaŭ ĉio konstatebla, kiam temas pri konstruo de paco inter nacioj. Tiu ekzameno de eraroj, kiun konas kaj aplikas teknikistoj, kiam ili konstruas novajn maŝinojn, plej ofte mankas en la arto de la homaj rilatoj kaj speciale de la interpopolaj klopodoj je komuna organizo por eviti militojn. La tekniko de paca kunvivado ŝajnas ne posedi la saman valoron, kiel la ceteraj teknikoj. Multe pli da homoj science klopodas observi maltaŭgaĵojn kaj serĉi plibonigojn al iloj mortigaj, ol fari la saman laboron sur la kampo de homa kunvivado, malgraŭ la fakto, ke historio, sociologio kaj psikologio tamen posedas metodojn por ekstudi la temon laŭ diversaj aspektoj. Ke la registaroj elspezas sumojn ne centoble, sed miloble pli grandajn por la tekniko mortiga, ol por la aliaj, tio estas ja banalaĵo, kiun oni konsideras kvazaŭ normala. En helpa mondlingvo, tute male, mi juĝas normala kaj necesa proveton, eĉ modestan, por interesigi la publikon al tiu alia tekniko. Jen la kaŭzo, kial mi decidis verki en Eo ĉi tiun studon, kiun mi jam prezentis en franca lingvo sub alia formo, kaj povas nun pliriĉigi per pluaj observaĵoj.“

Kio en tiu libro unuavide ŝajnas havi neniun ligon kun Eo, la esperantismo kaj la ideoj de L.L. Zamenhof, tamen bone montriĝas dum la legado, ke la temo de la federalismo ankaŭ iel koncernas la zamenhofajn konsiderojn kaj inverse. Tial en ĉi tiu Antologio estas represita almenaŭ la parto pri la federala sperto de la Svisa Konfederacio, kiun Privat pentras laŭ ĝia historia genezo kaj laŭ ĝiaj ĝeneralaj principoj. La prezentita teksto eble ne plu estas tute valida en ĉiuj detaloj, ĉar ĝi estis verkita antaŭ duona jarcento; tempoj ŝanĝiĝas kaj kaŭzas influon eĉ al la tre konservativa svisa federalisma koncepto kaj al ĝia efektiviĝo kaj praktika evoluo.

*Originala teksto (en Esperanto):*

### *Malnova svisa ligo*

La svisa federala sperto estas parte pli malnova, kaj parte pli nova, ol la nordamerika: pli malnova, ĉar la unua konata ligo jam ekzistis en 1291, kaj pli nova, ĉar en 1848 la svisaj respublikoj imitis Usonon per nova konstitucio, kreanta veran federacian ŝtaton.

La malnova svisa ligo similis la Ligon de Nacioj (1920-1939). Ĉe la kunvenoj la diversajn registarojn reprezentis ambasadoroj kun la tasko defendi la honoron kaj intereson de apartaj ŝtatoj. La ĝeneralan savon oni plej ofte prizorgis nur tiam, kiam komuna danĝero minacis ĉiujn kune. Tuj, kiam forpasis la danĝero, la disputoj revekiĝis.

Ankoraŭ nun la svisaj infanoj lernas pri *Sankta Nikolao de Flüe*, kiu eliris el sia ermitejo por repacigi la delegitojn ĉe la Dieto post la venkoj kontraŭ la Burgunda duko ĉe la fino de la 15-a jarcento. Pli poste la polemikoj inter protestantaj kaj katolikaj ŝtatoj, inter urbaj kaj kamparaj respublikoj, dividis ilin tragedie. La svisa historio rakontas pri multaj interkantonaj militoj ĝis 1847.

Antaŭ la eltrovo de la fervojo kaj flugado Svislando estis siamaniere pli vasta, ol la nuna kontinento, se oni kalkulas la distancojn laŭ tempo necesa por ilin traveturi. Pli longa estis la vojaĝo de Ĝeneva delegito al la svisa Dieto en Lucerno, ol tiu de franca ŝtatisto de Parizo al Novjorko en 1957 !

Same kiel la Unuigita Naciaro, la malnova svisa ligo enhavis grandajn kaj malgrandajn ŝtatojn. Ekzemple la Berna Respubliko estis konata militpotenco, kies aliancon eĉ reĝoj deziris. Ankaŭ koloniojn ĝi havis: la landojn de Vaud kaj Argovio, regatajn kiel posedaĵojn.

La svisaj respublikoj havis apartajn aliancojn inter kelkaj el si, aŭ kun eksteraj princoj. Berno kaj Friburgo apogis la sendependan Ĝenevon kontraŭ la Savoja duko en la komenco de la 16-a jarcento. Post la reformacio la katolika Friburgo ĉesigis sian subtenon, kaj la protestanta Zuriko tiam protektis la kalvinistan respublikon, kiu deziris aliĝi al la svisa ligo.

La savoja duko subskribis aliancojn kun aliaj kantonoj, kaj tre longe malfruigis la akcepton de Ĝenevo. Li ofte ridis pri la fido ĝeneva ke la Dieto, „kiu neniam kapablas ion ajn decidi”.

Same kiel ĉe la Ligo de Nacioj, unuanimeco necesis por ĉiu rezolucio de la Dietoj, ĉar iu ŝtato rajtis poste konfirmi aŭ rifuzi ĝin. Nur komuna danĝero sukcesis kaŭzi provizoran unuiĝon. Tiam revekiĝis la spirito de la malnova kontrakto de 1291: „*En ĉiu ajn okazo de bezono ĉiu el la popoloj promesas al la ceteraj tuj alveni kun helpo je propra kosto kaj daŭrigi la helpon tiel longe, kiel necesos por rezisti al atako de mallbonuloj kaj trudi justan riparon de la domaĝoj.*”

### *Arbitracio deviga*

En la mezepoko la ligo de la svisaj ŝtatoj provis arbitracion, eĉ perfortan devigon al ĝi. La kontrakto de 1291 entenis paragrafon pri tio:

„Se aliflanke okazas konflikto inter kelkaj, la plej saĝaj federacianoj devas interveni kiel perantoj por pacigi la disputon en la maniero laŭ ili plej efika; la ceteraj federacianoj devas turniĝi kontraŭ tiu, kiu malakceptus tiun arbitracian juĝon.“

En 1438 okazis disputo inter la urba respubliko de *Zürich* kaj la kamparaj ŝtatoj *Schwytz* kaj *Glarus* pri la heredaĵo de la grafoj de *Toggenburg*. Ties landoj aliĝis al la du nomitaj kantonoj, kiuj kuŝas ĉe la Lago de *Zürich*, oriente. *Zürich* protestis. Ĝi punis la du najbarojn, fermante al ili sian merkaton kaj malpermesante la importon de iliaj komercaĵoj, kiuj kutime alvenis per ŝipo sur la lago. Estis ekonomia venĝo.

La svisa Dieto proponis arbitracian aranĝon, ja pacigan, sed pli kontentigan al *Schwytz* kaj *Glarus* ol al *Zürich*. Ĝi eĉ aldonis averton solenan:

„Ni opinias, ke tiu, kiu ne akceptos tiun juĝon, montros per tio malamikan intencon al tiu, kiu ĝin akceptas kaj ni protektos tiun, kiu ĝin akceptos, kontraŭ la alia per ĉiuj niaj fortoj, oferante niajn vivojn kaj havaĵojn.“

*Zürich* kompreneble rifuzis submetiĝi, kaj tiam oni proponis uzi la metodon antaŭviditan en 1351, t.e. konferencon inter la du kontraŭaj partioj sub prezido de neŭtralulo.

Rimarkinde estas, ke la respubliko *Basel*, aliĝante al la svisa ligo en la XIV-a jarcento, decidis konservi neŭtralecon en interkantonaj disputoj, kaj uzis tiun sintenon ĝuste kiel paciganto en kelkaj okazoj.

Tamen *Zürich* daŭre malakceptis la juĝon kaj daŭre fermis sian pordon al la komercaĵoj de *Schwytz* kaj *Glarus*, kiuj nepre bezonis ilin vendi por vivi. Ili do ekmilitis kaj alvokis la ceterajn kantonojn al helpo. Same faris *Zürich* plendante pri atako. *Uri*, *Unterwald*, *Berno*, *Lucerno* kaj *Zugo* apogis la du ŝtatojn, kiuj akceptis la juĝon, kaj kontraŭbatalis tiun, kiu rifuzis. *Zürich* alvokis la helpon de Aŭstrio kaj poste de Francujo, sed ne sukcesis venki. Tiam ĝi konsentis arbitracion en 1450.

La Berna ŝtatisto *Bubenberĝ* redaktis saĝan juĝon, kiu lasis la disputitajn landojn al *Schwytz* kaj *Glarus*, sed nek punis, nek humiligis *Zurikon* per devigo al riparo aŭ pago. Tiamaniere tiu respubliko restis en la svisa ligo, kies intelekta centro ĝi fariĝis.

### *Du patrujamoj*

Malgraŭ interkantonaj militoj la svisaj ŝtatoj konservis kaj defendis sian liberecon dum jarcentoj kontraŭ eksteraj potencoj ĝis la franca revolucio. Ties armeoj okupis Svislandon kaj ĝin starigis kiel

unuigitan „helvetan respublikon, unu kaj nedivideblan“. Malaperis la diversaj ŝtatoj kaj regis unu centra povo, sed la popoloj poste reagis kontraŭ sistemo trudita el ekstero.

Napoleono Bonaparte restarigis la kantonojn, sed aldonis al ili la kantonojn Vaud, Argovio kaj Tiĉino, kiuj fariĝis tiam respublikoj anstataŭ posedaĵoj. La viena packontrakto en 1815 devigis Bernon akcepti la novan egalecon kaj Svislando refariĝis nura ligo de suverenaj ŝtatoj, havantaj apartajn landlimojn, doganojn, poŝtojn kaj monojn. Iliaj ambasadoroj kunvenis en Dietoj, kiel antaŭe.

Dum unu generacio la konservativaj elementoj regis en la svisaj ĉefurboj post la venko de la monarkioj en Eŭropo, sed en 1830, post la pariza julia revolucio, pluraj kantonoj renversis sian malnovan aristokratan registaron kaj enkondukis la ĝeneralan voĉdonrajton de la viroj por elekti la estrarojn.

Samtempe disvastiĝis nova sento, la tutsvisa, kiu ek-aldoniĝis al la malnova patrujamo kantona, la tradicia fideleco al la aparta ŝtato. Malrapide, jaron post jaro, kreskis tiu dua patriotismo, kiun florigis interkantonaj kongresoj, studentaj kunvenoj, festoj kaj bankedoj, dum kiuj oni honoris aŭ kantis la svisan ideon.

Sed ankaŭ viglaj kontraŭstaroj aŭdiĝis. Multaj patriotoj konsideris kvazaŭ blasfema tian transpason de unu sento al alia. Dek jaroj necesis por akceptigi unu novan flagon, ruĝan kun blanka kruco, por ĉiuj kantonaj armeoj. La „helvetismon“ oni timis tiam same kiel la internaciismon unu jarcenton pli poste.

Demandu hodiaŭ iujn svisajn infanojn, kian patrujon ili havas, kaj ili verŝajne respondos: Svislandon. Antaŭ unu jarcento ili respondis: Ĝenevon, Bernon aŭ Tiĉinon. La patrujo tiam estis la malgranda loka ŝtato, kaj preskaŭ antipatriotaj ŝajnis esti ankoraŭ tiuj homoj, kiuj predikis helvetismon.

Ĉiu el tiuj apartaj respublikoj ankoraŭ nun konservas siajn proprajn flagon, himnon kaj festotagon, sed dum ceremonioj oni ĝenerale pendigas ambaŭ standardojn, la kantonan kaj la federalan. Neniu ofendiĝas nun, kaj oni konstatas, ke unu sento ne detruas la alian. Kial ne povus okazi simile per tria flago, simbolo de la tuta homaro? Tiu de la Ruĝa Kruco aŭ de Esperanto jam naskas respekton apud la ceteraj.

### *Konferderacio kaj kantonoj*

Same kiel la tutsvisa flago simbolis la finon de la interkantonaj militoj kaj la federalan unuiĝon de la sendependaj respublikoj, tiel same tutmonda flago povas simboli la homaran esperon al paco, kaj ne ofendi iun ajn. La usona sperto kaj la svisa pravas egale, ke du popolaj sentoj, iam konsiderataj kiel rivalaj aŭ kontraŭaj, fine kunloĝis tute harmonie en la koroj kaj eĉ kompletigis unu la alian. Al tio havis influon kutimo, lernejo, poezio, komunaj entreprenoj, kunaj fervoroj, entuziasmoj aŭ funebroj.

Kiu ŝajnis en 1830 malbona patrioto en la okuloj de siaj samŝtatanoj bernaj aŭ ĝenevaj kun vido malpli vasta ol la sia, tiu sama homo, jarcenton poste jam fariĝis honorata pioniro nacia, konstruinto de la komuna patrujo. Ĉiu nun konstatas, ke la pli vasta ne detruis la malpli vastan, sed male, donis al ĝi pacon kaj trankvilecon.

Sendube ĵaluzoj, preferoj, simpatioj kaj malŝatoj ne mortis inter la svisaj respublikoj, sed malaperis apartaj armeoj kaj tial, anstataŭ militoj, nuraj ŝercoj aŭ karikaturaj esprimoj esprimas la negativajn sentojn. Tie kuŝas malpli grava danĝero. Ĝenerala bonhumoro, eĉ foje ridema, glatigis per familia kamaradeco la malnovajn akrajn angulojn.

En 1832 la nova emo al helvetismo instigis al klopodo por plifirmigi la ligan inter la svisaj ŝtatoj. La komuna Dieto elektis komisionon por ekzameni la eblecon krei tutsvisan konstitucion. Oni tiamaniere fondus veran federalan registaron, kiu tamen respektus la memregon de la dudek-du apartaj ŝtatoj. La komisiono preparis projekton, sed ĝin oni rifuzis. La publika opinio tiam estis ankoraŭ ne sufiĉe preta por tiel granda paŝo antaŭen.

Necesis al la svisoj unu plia kaj lasta interkantona milito, por ilin konvinki. Por tiu sanga malfeliĉo ili ekkomprenis, ke la sankta suvereneco de la diversaj ŝtatoj endanĝerigas ilian sendependecon, ĉar atakoj, eĉ defendoj, altiras eksterajn intervenojn kaj riskas engluti ĉiujn sub ondegoj de fremdaj maroj.

### *Laŭ usona modelo*

Inter 1830 kaj 1848 demokrataj ideoj progresas en tuta Svislando, sed ne mankas akra rezistado de la pli riĉaj klasoj. Ankaŭ batalas la radikala partio kontraŭ eklezia regado de la lernejoj. Argovio forpelas la monaĥojn. Male Lucerno alvokas jezuitojn por gvidi la ŝtatajn lernejojn.

En tiu katolika ŝtato, Lucerno, la radikaluloj protestas, kaj iliaj sampartianoj el Argovio alkuras por helpo kun armitaj bandoj. La tutsvisa Dieto ekzamenas la eblecojn de pacigo. Unuflanke ĝi forpelas la jezuitojn el Svislando, aliflanke ĝi diskutas rezolucion por malpermesi ĉiajn armitajn societojn.

Sed jam sep katolikaj kantonj formis apartan ligan (*Sonderbund*) kun milita kaj politika interkonsento. Ilin apogas Aŭstrio, Francujo kaj Sardujo, dum Anglujo male protestas kontraŭ eksteraj intervenoj en la svisaj aferoj.

Antaŭ ol tiuj intervenoj havas tempon efektiviĝi, la Dieto formas federalan armeon, kaj generalo *Dufour* okupas rapide Zugon, Friburgon kaj Lucernon.

Malveninkte, la *Sonderbund* estas devigata dissolviĝi, kaj ĉie demokrataj registaroj anstataŭas la malnovajn. Saĝa kaj homama sintenado de la venkinta generalo ebligas repaciĝon inter la batalintoj.

Tiam la publika opinio fine komprenas la danĝeron de apartaj militaj suverenecoj, kaj la Dieto akceptas finfine federalan konstitucion laŭ la nordamerika modelo de 1787.

Tion, kion oni rifuzis en 1832, oni bonvenigas en 1848 post kruela sperto.

De tiam Svislando ne estas plu nura ligo, sed fariĝis vera federacio kun forta, centra registaro, unu armeo, unu poŝto, unu mono kaj komuna dogano nur ĉe la eksteraj landlimoj.

Federala unueco superpasas kantonajn suverenecojn. Ĉiuj dudek-du ŝtatoj havas po du delegitoj en la federala ĉefurbo Berno, sed la tuta popolo elektas sian Nacian Konsilantaron laŭ la nombro de loĝantoj, por esprimi sian ĝeneralan volon.

Estas la sama sistemo, kiel la usona Senato kaj Ĉambro de Rerezentantoj. Sed la registaro malsamas. Anstataŭ unu prezidanto respondecas, sidas kvin (nun sep) ministroj en tiel nomata „Federala Konsilantaro“, kiun elektas la centra Parlamento (ambaŭ ĉambroj kune). Kutime la samaj homoj el diversaj partioj estas reelektataj ĝis morto aŭ maljuniĝo.

La Federala Tribunalo similas al la usona Supera Kortumo, sed ĝi ne rajtas nuligi iun federalan leĝon. Nur la Parlamento povas decidi, ĉu leĝo estas laŭkonstitucia aŭ ne, kaj la svisa popolo antaŭ nelonge en referendumo rifuzis doni al la Federala Tribunalo tiun kompetentecon.

### *Kontraŭstaroj al federalismo*

Kiu volas atente studi la federalismon inter ŝtatoj, tiu trovas en la nordamerika „*Federalist*“ de Hamilton kaj en la raportoj pri la diskutoj en Filadelfio (1787) tre valoran dokumentaron. Similan valoraĵon havas la studanto en la protokolitaj diskutoj de la Svisa Dieto kaj de ĝiaj komisionoj en 1832 kaj 1848.

La usonan modelon oni jam de longe konis en Svislando, sed dum la unua periodo, en 1830, oni preskaŭ evitis ĝin citi, ĉar kiel ruĝa flago minaca ĝi aperis al la konservativuloj, fervoraj partianoj de absoluta suvereneco de ĉiu kantono.

En la parlamento de la ĝeneva respubliko la 27an de junio 1832 la fama naturalisto *de Candolle*, universitata rektoro, protestis kontraŭ ideo, laŭ li blasfema:

- Kion emas la proponantoj de nova pakto? Ili volas tion, kion ni ne povas akcepti, nome federalan respublikon anstataŭ kunveno de suverenaj ŝtatoj..... Kun geografia situacio, moroj, tradicioj kaj lingvo malsamaj de tiuj de aliaj kantonoj ni ne povas deziri sistemon, kiu signifus pli malpli oferi nian propran naciecon.

Do por fama scienculo, en 1830 lia nacieco ne estis la svisa, sed la ĝeneva. Dum tiu sama diskuto, parlamentano *Lafontaine* nomis „utopia“ la proponon fondi tutsvisan unuiĝon.

- Ĉiu kantono, - li diris, - tro ŝatas sian suverenecon kaj rigardas ĝin kiel tro karan trezoron por deziri sistemon, kiu ĝin grave malfortigas.

Kontraŭe la reformistoj insistis pri la malavantaĝoj de absolutaj suverenecoj:

- La Dieto nun kapablas havi nenian opinion, nenian volon, ĝi estas nura parolejo de dudek-du suverenaj volo.

Ĉe la komisiono de la svisa Dieto, kiu sidis en 1832 en Lucerno, profesoro Rossi notis, kiel malfacile kapablis la diversaj respublikoj eĉ imagi devigon de interhelpo aŭtomatan kaj ĝeneralan:

- Ili volas ja ricevi garantion de helpo, sed kondiĉe, ke ĉiu rajtu ne helpi tiun aŭ alian neŝatatan kantonon..... Vi do volas, ke Vaud portu helpon al Neuchâtel kaj Valiso [sic!], ĉu ne? Nu, tiam necesas, ke la tutsvisa kontrakto devigu la kantonon Vaud helpi ankaŭ al Bern en danĝero!

Unu jarcenton poste neniu civitano-soldato plu dubas, ke necesas defendi Zurikon, Ĝenevon aŭ Tiĉinon sendiskute laŭ la loko de atako. Ekzistas nur unu federala armeo kun unu centra stabo. Nur la diverseco de lingvoj dividas la taĉmentojn, sed la ordonoj, uniformoj kaj materialo estas unusamaj.

### *Problemo de la plimulto*

Dum la diskuto de eventuala konstitucio federala por Svislando, unu el la plej interesaj argumentoj kontraŭ ĝi estis la timo, ke plimulto de ŝtatoj povus ion trudi al la malplimulto. Tiam oni riskus reziston de la malkontentaj ŝtatoj, kaj iliaj anoj defendus unu patrujon kontraŭ la alia, la malgrandan kontraŭ la pli granda. La civitanoj povus esti disŝirataj inter du devojn, ambaŭ laŭleĝaj siamaniere.

Efektive okazis tiel dum la *Sonderbund*-a milito, kaj ankaŭ en Nord-Ameriko dum la milito pri sklaveco, inter sudaj ekŝiĝintaj ŝtatoj kaj la nordaj, fidelaj al la federacio.

Por eviti tian danĝeron, necesas konstrui la federacion ne nur sur bazo de aliĝantaj ŝtatoj, sed samtempe sur bazo de aliĝantaj individuoj. La svisoj devas senti fidelecon ne nur al sia kantono, sed ankaŭ al la tuta unuiĝo, kaj havi rektan kontakton kaj rilaton kun ĝi. Krom kantonaj leĝoj, necesas havi ĝeneralajn leĝojn, kaj oni devas malebligi, ke ili kontraŭstaros unu la aliajn.

La komisiono de la svisa Dieto, kiu preparis la konstitucion de 1848, proponis:

„Federalan sistemon, kiu respektos la du elementojn de la svisa vivo (krom la urbaj kaj vilaĝaj komunumoj), nome la ĝeneralan aŭ tutnacion elementon kaj la kantonan aŭ apartan elementon. La nova sistemo donu al ĉiu el tiuj elementoj tion, kio apartenas al ĝi por la bono de la tuto de la diversaj partoj. Ĝi akordigu ilin harmonie, submetante la membrojn al la korpo, subigante la kantonan elementon al la tutnacia.

Oni antaŭvidis, ke la konsilantaro de la ŝtatoj protektos la kantonajn rajtojn kaj la Nacia Konsilantaro prizorgos la komunajn interesojn.

En la tutnacia ĉambro de la federala parlamento la elektitoj prezentas plej ofte ideojn aŭ tendencojn de personoj loĝantaj en multaj kantonoj. Katolikoj aŭ socialistoj grupiĝas laŭ siaj partioj, ne laŭ sia kantono, escepte en okazoj, kiam grava loka intereso estas tuŝata. La plimulto ĉe la voĉdonoj do reprezentas opinion de la pli granda parto de la popolo en la tuta federacio. Ĝi esprimas la volon de la individuoj kaj ne ĉiam la deziron de la plimulto de la kantonaj registaroj.

Mankis tia ĉambro al la Ligo de Nacioj kaj ankaŭ al la Unuiĝintaj Nacioj. Aldono de popola parlamento al kunveno de nuraj registaroj estas neevitebla, se oni volas krei veran unuiĝon kun centra aŭtoritato tuŝanta la homojn mem.

En Svislando eĉ la Ĉambro de la ŝtatoj iom post iom evoluis, kaj en multaj kantonoj la popolo mem elektas la du delegitojn al ĝi. Same en Usono por la Senato.

### *Svisa sperto pri suverenecoj*

Same kiel la usona, la svisa federalismo estas ceda kompromiso inter du suverenecoj. Artikolo 3 de la konstitucio (1848) diras:

„La kantonoj estas suverenaj ĉiam, kiam la federala konstitucio ne limigas ilian suverenecon. Estante tiaj, ili rajtas ĉiujn povojn, kiuj ne estas konfidataj al la federala aŭtoritato.”

La usona konstitucio (1787) ne entenas teorian principon en la samtema artikolo (sekcio 8). Ĝi donas nur liston de la kampoj, en kiuj kompetentas la Kongreso, kaj ĝi lasas la reston al la ŝtatoj. Artikoloj 9 kaj 10 malpermesas al unu kaj al la aliaj tiujn kampojn, en kiuj la povoj konfliktus.

Ekvilibro inter la duspecaj aŭtoritatoj ebligis al la svisaj respublikoj grandan ekonomian prosperon, kaj la kantonaj memregoj tute ne malebligis tre solidan centran registaron, kiu ĉefe zorgis pri novaj kampoj de la vivo, malfermitaj de la modernaj tempoj kaj de la internaciaj rilatoj.

La sep svisaj ministroj, nomataj „*Federalaj Konsilistoj*”, estas preskaŭ ĉiam reelektataj, eĉ de siaj politikaj kontraŭuloj. Same kiel la usonaj superaj juĝistoj, ili plej ofte restas ĉe sia tasko ĝis la morto. Fakte, se oni volus kritiki la svisan kutimon, oni povus eĉ bedaŭri tro pezan daŭrecon. Ekzemple ĝi ne faciligas ŝanĝon de socia tradicio.

Sub la tria kaj kvara francaj respublikoj la registaro ĉiumomente falis, kaj tial suferis iom la fido je parlamenta demokratio. Male, en Svislando la Federala Konsilantaro neniam ekŝiĝas, sed simple obeas, se la parlamento per voĉdono, aŭ la popolo per referendumo, rifuzas leĝon, kiun ĝi proponis.

Ke Svislando ne sekvis plene la skandinavajn landojn en ilia socia progreso, tion klarigas parte la fakto, ke ĝiaj laboristoj kaj kamparanoj ne sukcesis akordiĝi. Ni ankaŭ notu la obstinon de ĝiaj viroj por rifuzi al la virinoj la rajton je voĉdono.

Sed la federala sistemo certe sukcesis garanti al la svisaj respublikoj ilian sendependecon. Ĝin protektas are ilia unuiĝo kun neŭtraleco, rekonata de la grandaj potencoj eksteraj, kaj ere iliaj kantonaj registaroj, kiuj fidele konservas la lingvojn, kutimojn kaj religiajn apartaĵojn de tiuj diversaj popoloj.

Svisa ŝtato presas sur sia leterpapero „*Respubliko kaj Kantono de Ĝenevo*”, ekzemple. Ĝi mem elektas sian kantonan parlamenton kaj propran registaron. En la plej malnovaj svisaj respublikoj de la montvaloj ankoraŭ kunvenas la tuta vira popolo en ĉiujara „*Landsgemeinde*“ (landkomunumo), antikva formo de rekta demokratio, laŭdata de *Rousseau* kaj eĉ de *Bonaparte*.



### *Diverseco lingva*

Ĉar la dudek-du svisaj respublikoj konservas siajn proprajn parlamentojn kaj registarojn, ili memfakte konservas siajn lingvojn kaj apartajn kulturojn. Kvankam tri kvaronoj de la tuta loĝantaro parolas germanajn dialektojn kaj skribas germane, la franclingvaj kantonoj restas plene frankulturaj, kaj same Tiĉino restas itallingva kaj Grizono parte romanĉa.

En la centra registaro la germanlingva plimulto emas lasi al la latinaj svisoj eĉ pli grandan lokon, ol ili rajtus laŭ nura proporcio nombra. Tia tolero kaj kutimo esprimas la volon akcenti la federalan unuecon en diverseco.

Tiu fakto pruvas, ke eĉ energia gento, kiel la germana, kapablas edukiĝi demokrate al respekto por alia kukturo eĉ malplimulto, anstataŭ trudi la sian. La federala sistemo faciligas tian edukadon.

Kiam germanlingvaj hotelistoj kaj komercistoj el la nordo tro multigis germanlingvajn surskribaĵojn en la suda respubliko Tiĉino, kie kuŝas Lugano kaj Lokarno, tiam la kantona registaro decidis diversajn paŝojn por protekti la itallingvan karakteron de sia lando. En fama proceso eĉ la Federala Tribunalo la superaj svisa juĝistoj pravigis tiun defendon de la propra landkulturo.

Ankaŭ la protestantoj formas en Svislando la plimulton, sed la plej malnovaj respublikoj estas katolikaj. Multaj aliaj havas miksan loĝantaron. En Glarus la du eklezioj uzas la saman ĉefpreĝejon dimanĉe je malsamaj horoj por sia diservo. Post religiaj militoj kaj post polemikoj tre akraj en la fino de la deknaŭa jarcento, nun fine la interkreda paco montriĝas al ĉiuj kiel granda feliĉo.

Tiel malgraŭ multaj malperfektaĵoj kaj eĉ malfruiĝo en sociaj kampoj, Svislando vivigis, kiel Usono, federalan civilizon, kies sperto povas utili ne nur al ĝi mem. Al Eŭropo ĝi havigas eksperimentan materialon kun interesaj rezultatoj.

Ĝi pruvas, ke federala sistemo ebligas konservi apartajn liberecojn kulturajn, politikajn aŭ religiajn, kaj akceli samtempe komunan ekonomian progreson kaj pacan kunlaboradon. Kiom la svisaj respublikoj perdis je suvereneco, tiom ili gajnis je sendependeco, trankvileco kaj profitigaj interŝanĝoj.

### *Federala sento*

La federala sento radikiĝas kaj profundiĝas pro komunaj institucioj. En Svislando ĝin favoras la lernejoj, sed ĉiam kun atenta zorgo pri la du flankoj: unueco kaj diverseco. Li infanoj lernas ami la „personecon“ de ĉiu cetera svisa respubliko, ne nur de la centra unuiĝo. Ili devas koni iliajn flagojn, kolorojn, kostumojn, pejzaĝojn kaj famulojn. En svisaj lernejoj la blazonŝildoj de la dudek-du kantonoj ornamas plej ofte la murojn de la klasoj aŭ koridoroj.

Tiamaniere la geknaboj lernas kompreni la elementon de reciprokeco, kio estas fundamenta por iu ajn federacio. Ankaŭ la nomo de la tuta lando helpas al tio. Hejme sin sentis nek la slovakoj en la tiel nomita Hungarujo, lando de hungaroj, nek la hungaroj en Ĉeĥoslovakujo, lando de ĉeĥoj kaj slovakoj. La nomo

mem estis malhelpo. Ukrainoj kaj litovoj de la malnova Polujo preferis la nomon „Serenissima Respublica“, ĉar ĝi entenis la tri popolojn.

Ankaŭ la moderna Belgujo kaj Svislando havas senpartiajn nomojn. Imagu tion, kio okazus, se tiuj regnoj estus nomataj Flandrujo aŭ Valonujo por difini la tutan landon anstataŭ nur parton de ĝi! Centmiloj da homoj sentus ofendon pro nura vorto.

Ĉar li bone komprenis tion, *Zamenhof* proponis neŭtralajn landnomojn en sia fama „*Letero al la Diplomatoj*“ en la jaro 1915, kaj pro la sama kaŭzo disvastiĝis novaj nomoj imititaj laŭ la modelo *Bolivio*, *Kolombio*, *Aŭstralio*, kiuj ebligas nomi la homojn per sufikso „ano“ anstataŭ per genta substantivo. Mahometano bengala preferas enskribiĝi kiel Indiano ol kiel Hindu, ĉar tiu ĉi lasta vorto por li signifas genton kaj religion, ne lian.

Civitano el Ĝenevo sentas sin romando kaj sviso, civitano el Zŭrich sentas sin alemano kaj sviso, tute simile, kiel franco en *Quebec* kaj anglo en *Toronto* sentas sin kanadanoj, eĉ parolante malsamajn lingvojn.

Tute prave insistis *Zamenhof* pri la graveco de neŭtralaj nomoj. Ili certe faciligas unuiĝon de popoloj diverslingvaj kaj diversreligiaj. Pro tio li tre bonvenigis la vorton *Usono* kaj *usonano*, kiuj ankaŭ ebligas eviti la malprecizajn nomojn *Ameriko* kaj *amerikano*.

Memoru, ke en la provinco Galicio de la aŭstro-hungara imperio homoj sin ĵetis iam sub lokomotivon, ĉar la surskriboj de la vagonoj estis presitaj pole kaj ne ukraine. La svisaj fervojistoj uzas la vortojn *Basel* kaj *Genève*, evitante kiom eble „*Bâle*“ kaj „*Genf*“, kiuj kaŭzus pli ofte ridon ol koleron.

## ***Antologio XXVIII***

**Ric Berger**

Redaktoro de *Currero International*

### **IALA e Esperanto (1960)**

En: *Currero International*

#### *Enkonduko:*

En sia artikolo en la Interlingua-informilo *Currero International*, aperinta en majo/junio/julio 1960, ĝia redaktoro Ric Berger (1894-1984), rifuzis la riproĉon de la franca e-isto André Albault, kiu skribis, ke IALA „interesiĝis tro malmulte pri Eo“. Berger submetis al Albault sian supozon, ke li konas tiun organizon nur tra citaĵoj de aliaj e-istoj kiel Waringhien, kiu mem citis el libro de Manders.

En sia repliko Berger, kiu iam mem estis e-isto, poste idisto kaj occidentalisto antaŭ ol fariĝi unu el la plej signifaj adeptoj kaj propagandistoj de Interlingua (IALA), atentigis, ke verŝajne malmultaj organizoj krom IALA, tra ties fondinto Alice Morris, kiu ankaŭ estis fervora e-istino, investis en siaj unuaj 15 ekzistojaroj tiom da tempo kaj precipe mono en la projekton Eo. Kiel konate, IALA poste direktis sin sur la naturalisma vojo en planlingvistiko.

La diskuto estas daŭrigita pere de la klarigo de Albault, ke la facileco de Eo, precipe kompare kun naciaj lingvoj, estis science pruvita. Sed laŭ Berger la facileco de Eo estas mito – ĝuste ĝia deviga akuzativo kaj aliaj reguloj estus laŭ Berger superfluaĵ. Kaj Berger invitis la francan e-iston, kiu atentigis pri la sociologia aspekto en planlingvo, klarigi kial tiom da e-istoj forlasis la zamenhofan lingvon post 1887 kaj serĉis pli taŭgan solvon.

Laŭ Berger Eo fiaskis, ĉar malgraŭ multaj jardekoj da intensa propagando ĝi ne gajnis la seriozan intereson flanke de la scienco, kaj ĝuste la scienco estus la kampo, kiu plej urĝe bezonus internacian helplingvon.

#### *Originala teksto (en Interlingua):*

Le revista francese *Neos de Grasse* (Alpes maritimes, Francia), in su numero 18 publica un articulo in le qual Sr. Dr. André Albault de Toulouse reprocha a IALA „haber se interessate troppo pouco a Esperanto“; il sembla que Dr. Albault cognosce le labores de iste association solmente per alicun lineas citate del Esperantista Waringhien, ab le libro de Dr. Manders ‘Vijf Kunsttalen’. Nos spera dunque que Sr. A. volera ben facer se un opinion in re IALA per un plus directe information al fontes mesme de nostre movimento.

Le reproche dirigite verso IALA de haber „negligite“ Esp-o es in facto le ultime que on poterea expectar! Illo monstra quanta urgente ha devenite un publication del longe e minutiose recercas de IALA, in re omne systemas de linguas international. In realitate, nulle gruppe de judices o expertos ha consacrata tante moneta e tempore como IALA in studiar le possibilitate offerite per Esp-o como lingua international. On sape que su promotrice, Alice Morris, era un fervente esperantista, e le subsignate, qui in 1935 era recipite de illa in le ambasada de USA, in Bruxelles, memora ancora la entusiasmo con lequal illa parlava in, e in re, Esperanto. Il es impossibile esser plus esperantophile que IALA durante le 15 prime annos de su activitate, usque iste puncto que le multiple experientias facite e financiate de illo in le scholas del diverse paisas era basate quasi unicamente super le practica de Esperanto, e multo paucio super iste de Ido.

Si IALA ha evoluite verso le naturalisme, es justo a causa de iste experientias, e per un decision de su linguistas. Le sondage de 1947, specialmente, ha provate que in omne paisas consultate le publico preferava *le aspectu natural* del parolas international a lor mutilation per la orthographia e grammatica de Esp-o e Ido.

Sr. Albault opina que „il haberea essite interessante apprender scientificamente quales son le rationes profunde que face que *omne* istos qui ha usate Esp-o senti un sentimento de contentamento, de facilitate in iste uso, sensation que illes nunquam senti al mesme grado con un altere lingua, mesmo con lor lingua maternal“.

*Esperanto non es le sol lingua in causa !*

In realitate le sensation de facilitate, de „liberation“, describite de Sr. A., es sentite in le uso de qualcunque lingua international create, a causa del elimination del irregularitates inherente al linguas national.

Le maneabilitate depende primo del practica in le diverse linguas international, e personalmente nos ha sentite lo in omne systemas que nos ha practicate, minus in Esperanto a causa del accusativo obligatori e de multe altere regulas superflue.

Esque Sr. Albault pote explicar nos pro que tante personas qui ha apprendite e usate Esp-o ha abducite se de ista lingua e cercate alique melior. E pois que Sr. A. concede un grande importantia al aspectu sociologic del problema nos pote demandar le per que ex le 600 projectos de lingua international parite desde 1887, le  $\frac{3}{4}$  al minus son debite satisfacte *omne adeptos*, como Sr. A. crede lo, e que solmente un parve proportion del usatores sorti convincite de iste experientia.

Nos concorda con Sr. A. pro concluder que on deberea anque prender in consideration le „relationes inter le homine e le lingua“ e non solmente judicar secundo le relationes del linguas inter se. In definitive un lingua es facite pro le homines e non pri se ipse. Vamos dunque vider le... *problema social secundo su relation con le homines*, ubi illo appare nunc sub un aspectu eloquente.

Malgrado 73 annos de intense propaganda, Esp-o ha nunquam obtenite que le scientia interessa se a illo seriosamente, e tamen es justo le scientia que ha le plus grande besonio de un lingua auxiliari international.

Circa 1905 le scientista german Ostwald habeva comenciate un campania in le circulos scientific pro un lingua international, primo pro Esp-o, ma iste systema non satisfaceva le longe, e con Couturat ille promoveva Ido, usque su morte. Interim ille habeva interessate al problema su discipulo Cottrell qui deveniva le instigator del foundation de IALA. Dunque finalmente le natural evolution del scientistas vadeva del artificialitate de Esp-o al naturalitate de Interlingua. Nos anque signala passante le tentative de un mathematico, René de Saussure, de crear, ante 40 annos, un Scienca Revuo, ma sin successo.

Presto post le publication de Interlingua, le obra de iste IALA, que ha tanto mal laborate, secundo Sr. A., 9 congressos scientific international ha usate lo como lingua official e publicava lor summarios in illo, includite le congresso de endocrinologia de iste estive in Copenhagen. Le altere factos, nos lectores cognosce los jam, e illos continua.

## **Antologio XXIX**

### **Bruno Graf**

Prezidanto de Svisa Esperanto-Societo

### **Unuigi la fortojn kaj intensigi la eksterajn rilatojn (1960-61)**

En: *Svisa Espero*

#### *Enkonduko:*

Kiam Bruno Graf (\*1928) transprenis en la jaro 1960 la prezidan funkcion en Svisa Esperanto-Societo (SES), li ja trovis bonstatan societon, en kiu la membroj harmonie kunvenis kaj kie la unuopaj Eo-organizaĵoj en Svislando pace kunekzistadis. Malgraŭ tiu ŝajna idilio organiza, Graf havis la impreson, ke du aferoj ne estas kontentigaj: unue la membroj de la diversaj asocioj agadis tro dise kaj izolite en siaj lokaj aŭ fakaj kluboj, do ili ekzistis enfermitaj en siaj propraj medioj, kaj la asocia vivo de la e-istoj komencis riski stagni.

Due: la ekstera mondo ne sufiĉe rimarkis la aktivecojn de la e-istoj. Ĉar la eksteraj rilatoj estis tro neglektataj. Per pasiveco ne eblus atingi la grandiozajn celojn, kiujn la e-istoj devus aŭ volus realigi, precipe post la sukcesa UNESKO-rezolucio de la jaro 1954, kiu esprimis favoron al Eo.

En tri artikoloj, kiuj aperis en la tiama bulteno de SES, *Svisa Espero*, la nova prezidanto klare esprimiĝis pri tiu situacio kaj ne hezitis admoni, kio devus ŝanĝiĝi.

En la unua artikolo de tiu serio, publikigita en *Svisa Espero* en aŭgusto 1960, prezidanto Graf atentigis pri la risko de stagno kaj pri la danĝero de indiferenteco kaj donis praktikajn ideojn aŭ konsilojn kiel eviti ĝin kaj kiel eblus pliefikigi la publikan informadon pri Eo.

En sia dua kontribuaĵo, aperinta en *Svisa Espero* en oktobro 1960, Graf skizis kiel oni povus plibonigi la situacion de la propra Eo-klubo, nome per efika aktorado fare de kvalifikita programestro kaj kompetenta varbestro. De tiuj du roluloj esence dependus la sukceso de la agado. Diletantecon kaj amatorecon oni devus nepre eviti, kaj la moderna scienco postulus seriozajn metodojn.

En la tria artikolo de februaro 1961 Bruno Graf alvokis al unuigo de la fortoj. Por disvastigi Eon necesus havi pacon kaj harmonion de la aktoroj, kiuj devus eviti internajn konfliktojn, eĉ se ili havas diverĝajn opiniojn. En SES li vidis taŭgan forumon, kie centriĝas la fadenoj de ĉiuj grupestroj, asociestroj, gvidantoj kaj aktivuloj de la diversaj lokaj kaj fakaj Eo-organizaĵoj en Svislando.

Kiam la sama Bruno Graf revenis en 1997 post longa movada foresto ĉe la pinto de SES kiel ĝia prezidanto, li fakte konstatis la samajn problemojn kaj obstaklojn en la svisa Eo-movado kiel ili ekzistis komence de la 1960aj jaroj. Malgraŭ tio li ne rezignis kaj dum multaj jaroj ankoraŭfoje tiris la ŝipon digne, paciencoj kaj ĉiam kun pripensitaj, utilaj konsiloj, eĉ se tio ofte estis malfacila kaj senkuraĝiga, probable pro la samaj stagnaj – kaj anarkiismaj – tendencoj en la Eo-movado kaj pro la samaj indiferenteco kaj malinteresiĝo flanke de la ekstera publiko kiel kvar jardekojn antaŭe.

*Originala teksto (en Esperanto):*

I.

*Svisa Espero*, aŭgusto 1960

### **Intensigi la eksterajn rilatojn**

La specialaj manifestacioj kaj aranĝoj dum la Zamenhofjaro portis al nia movado multajn amikojn. Ni devas nun daŭrigi tiujn klopodojn, ĉar multaj homoj ankoraŭ ne scias, ĉu Esperanto estas feriloko aŭ lingvo. Precipe nia junularo, sopiranta pri idealoj, laŭsperte volonte akceptas Esperanton, sed hodiaŭ ankoraŭ ne aŭdis vorton pri nia lingvo en la lernejo. Kiel longe la mondo rezignas pri perfekta internacia komprenilo, kiun ĝi urĝe kaj nepre bezonas? Kion ni entreprenas por batali kontraŭ tiu fatalismo? Diversaj vojoj kondukas al Romo. Unu el ili estas la intensigo de la eksteraj rilatoj.

En la numero 4/1960 de la internacia revuo *Esperanto*, profesoro Lapenna skribis jene: „Nuntempe tro multaj societoj – ne ĉiuj feliĉe – tute malatentas la instruadon. Fermitaj en si mem, ili elviviĝas en sia ‘familia rondo’ kaj kulpigas la tutan mondon, kun la escepto de si mem, pro la stagno. Kelkfoje oni ellaboras tutajn teoriojn por pravigi sian pasivecon.“

Efektive tiuj vortoj estas iom pravaj. La esperantista vivo estas plej ofte nur interna societa, kluba aŭ grupa vivo. La eksteraj rilatoj estas ĉiufanke neglektataj. Ili ĝuste ludas en Esperantujo unuarangan rolon, ĉar ili servas samtempe al la varbado kaj informado. Niaj najbaroj, ĉu ili estas homoj aŭ societoj, devas scii, ke ni estas esperantistoj kaj kion ni faras. Tiu nereakta informado estas ofte la plej efika propagando, ĉar ĝi ne havas la aspekton de propagando, sed de aktualeco. Tiu postulo por la intensigo de la eksteraj rilatoj koncernas ĉiujn ŝtupojn de la movado, grupojn kaj unuopulojn. Mi prvoas skizi kelkajn praktikajn ekzemplojn.

La agado sur la tutsvisa tavolo prezentas multajn eblecojn por eluzi la kontakton kun la neesperantista publiko. Vi aŭdis ĵus per la cirkulero n-ro 1, ke ni volas ligi la neorganizitajn Esperanto-amikojn al nia societo. Tiu entrepreno, se ĝi ricevos la subtenon de vi ĉiuj, tiros verdajn fadenojn al niaj simpatiantoj kaj densigos la reton de nia organizo.

Esence grava por la eksteraj rilatoj estas la regula eldonado de nia gazetara bulteno *Esperanto-Information*. Bedaŭrinde nur malmultaj redaktoroj publikigas niajn koncizajn informojn, tiel ke la granda amaso malmulte scias pri nia aktiveco. Sed la regula apero de nia bulteno sur la labortablo de la redaktoroj memorigas ilin vole-nevole, ke ni defendas nian ekzistadon kaj postulas nian rajton. La Centra Komitato [de Svisa Esperanto-Societo] studos la demandon, kiel ni povas influi la sintenon de la redaktoroj, por ke ili plenumu nian deziron.

Ankaŭ niaj kunvenoj, ĉu ĝeneralaj aŭ regionaj, devas stari en la servo de la informado. Okaze de la proksima regiona kunveno en Thun, ni invitos la instruistaron kaj aranĝos ekspozicion. Ne gravas, se la

rezulto de tiu klopodo estas modesta aŭ nula; grave estas, ke ni estu agemaj kaj trovu novajn spertojn kaj metodojn, eĉ se ni riskas fari erarojn.

Tre utila por la informado estas la migranta ekspozicio, kiun nun preparas s-ro Bühlmann. Ni esperas, ke multaj grupoj kaj unuopuloj uzos ĝin en aŭtuno kaj vintro por influi pozitive la publikan opinionon.

Novajn eblecojn por la eksteraj rilatoj malfermas la decido de Unesko, oficiale honori Zamenhof, kaj la decido de la komitato de UEA, iom post iom enkonduki en ĉiuj landoj samtempe Esperanton en la lernejojn. La Centra Komitato entreprenos diversajn klopodojn por plenumi ambaŭ rekomendojn. La Svisa Nacia Unesko-Komisiono promesis al ni sian moralan subtenon. Ni devas atenti, ke niaj proponoj estu realistaj kaj tute seniluziaj, se ni volas renkonti komprenemon. Ankaŭ la disvastigo de Esperanto estas arto de la eblo, samkiel la politiko.

Kion faru la lokaj societoj, kluboj kaj grupoj por intensigi la eksterajn rilatojn? Ili organizu komunajn kunvenojn kun aliaj societoj kaj daŭre sendu informojn al la loka gazetaro. Bone efikas montrokestoj, se ilia enhavo estas aktuala kaj se ili troviĝas en taŭgaj lokoj. Ni disponas ankoraŭ pri kelkaj montrokestoj, kiujn ni senpage liveras al grupoj. Interesuloj bonvolas turni sin al la Centra Komitato. La grupoj ankaŭ aŭdigu nian lingvon dum liberaj kunvenoj en la restoracioj aŭ dum ekskursoj. Lastjare parolis fraŭlino Kajino el Tokio en diversaj urboj kaj vilaĝoj. Estas domaĝe, ke ne pli da grupoj profitis tiun okazon, ĉar ŝi havis ĉie neatenditan sukceson. Eksterlandaj prelegistoj estas por la grupoj taŭga rimedo, atingi la neesperantistan publikon. (...)

Ni ne forgesu la aparte gravan rolon de ĉiu unuopa esperantisto. Multaj esperantistoj parolas nur inter samideanoj pri nia agado. Esperanto ne estas sekreta lingvo. Kial ne rakonti al niaj konatuloj pri niaj travivaĵoj? Kompreneble ĉiam kun takto sentrude. La personaj rilatoj de samideanoj estas tre utilaj por nia movado, ĉar ni havas pruvojn, ke la tiel-nomataj 'rilatoj' kelkfoje enorme faciligis nian laboron.

La eksteraj rilatoj meritas nian tutan atenton. Ĉio kion la neesperantista mondo aŭdos, vidos kaj legos pri ni, estas decida; sekve ni zorge preparu kaj pripensu ĉion, kion ni parolos, montros kaj skribos. La epoko de la amatore prezentita agado finiĝis. Ankaŭ la esperantistoj devas apliki fakajn kaj sciencajn metodojn.

## II.

*Svisa Espero*, oktobro 1960

### **Nia duobla tasko**

La laboro de ni esperantistoj ne estas facila. Necesas prudento kaj pacienco. Ĉiu aktivulo konas tiujn kondiĉojn, kaj pro tio ne reagas per rezignado, male, li provas daŭre plibonigi la rimedojn kaj metodojn. Ĉiu metiisto uzas el la ilaro la ilon taŭgan por la koncerna materialo. Ju pli malmola estas la materialo, des pli



akra devas esti la ilo. Tio estas tute natura leĝo. Ĉar la grundo por Esperanto ĝenerale estas ŝtona, utilas nur pintaj iloj. Tion scias jam delonge niaj spertuloj.

Sed nia tasko estas tamen multe pli malfacila ol tiu de iu alia societo. Ni devas praktiki la lingvon kaj samtempe disvastigi ĝin. Jen nia duobla tasko. Kantsocietoj kantas, kegloklubo keglas, piedpilka klubo ludas piedpilkon. La Esperanto-societoj kaj grupoj devas ne nur kulturi la lingvon, sed ankaŭ varbi novajn adeptojn. Ambaŭ postuloj estas same esencaj kaj same malfacilaj. Pro tio la vivo en la grupoj estas kelkloke tiel kriza. Mankas ofte la kapablaj kunlaborantoj kaj direktomontraj gvidantoj. La ĉefaj aktoroj en ĉiu grupo estas la *programestro* kaj la *varbestro*.

La *programestro* respondecas pri alternativaj, amuzaj, logaj programoj. Li devas regi la arton de la gvidado kaj esti preskaŭ lingvisto. De li dependas la grupaj vivo, entuziasmo, esperantisteco. Estas fakto, ke la grupaj rendezuoj kaj kunvenoj estas ĝenerale malbone vizitataj. Ĉu estas la kulpo de la programestroj? Ni devas foje serioze diskuti tiun problemon. Mi konas societon kun riĉaj programoj, sed la societanoj restas spirite indiferentaj. Kial? Ĉu la grupa vivo ne plu konvenas al nia jarcento? La Universala Esperanto-Asocio asertis antaŭ nelonge, ke la grupoj estas la kerno de nia movado kaj enketis pri tiu temo. La Centra Komitato [de SES] nun atendas la rezulton de tiu enketo por esplori ankaŭ niaflanke tiun problemon. Estas nepre necese, ke niaj grupoj reaktiviĝu, plivigliĝu. La programestroj havas la parolon...

La *varbestro* siaflanke devas esti preskaŭ faka reklamisto kaj instruisto, Ni konstatas, ke niaj aktivuloj devas majstri diversajn profesiojn. La moderna scienco postulas tion. La Centra Komitato aranĝos baldaŭ kunvenon pri propagando, kie partoprenos ĉiuj grupestroj, prezidantoj de fakgrupoj kaj aktivuloj. Ni aŭdos, kiel oni varbas en societo, en grupo, kiel izolulo, inter fervojistoj, inter instruistoj, inter naturamikoj. Resumoj pri tiuj diskutoj aperos en nia gazeto, por ke ankaŭ la forestantoj profitu el tiuj konkludoj. Jam alvenis la malvarmaj tagoj, la sezono por malfermi la varbadon. Ankaŭ la plej eta helpo estas utila al nia afero kaj neniam ĉagrenu, se la klopodoj ne montras tujan rezulton. Tre ofte la semoj maturiĝas post semajnoj, post monatoj, post jaroj. Neniu peno estas perdita, neniu streĉo vana.

La programestro kiel ankaŭ la varbestro devas plenumi unu kondiĉon: ambaŭ devas detale kaj serioze prepari sin, antaŭ ol ili aperas antaŭ la publiko. Diletantismo estas danĝera, kaj estas ofte la kaŭzo de malsukceso. Grupoj, kiuj posedas kvalifikitajn programestron kaj varbestron, ne devas timi la estonton. Ili memoru pri tio dum la venontaj aŭtuno kaj vintro kaj faru, se bezone, la necesajn decidojn. Ne forgesu nian duoblan taskon.

III.

*Svisa Espero*, februaro 1961

### **Unuigi la fortojn**

Sur glumarko de la Universala Esperanto-Asocio staras la vortoj: „Unueco estas forto“. Ne estas hazardo, ke la internacia esperantistaro elektis tiun sloganon. Unueco ĉiam tiam estas necesa, kiam oni estas

relative malforta aŭ kiam grandaj malhelpoj baras la vojon. La Esperanto-Movado por si mem estas forta, sed ne sufiĉe forta vid-al-vid-e la enormaj taskoj plenumotaj.

Ofte oni fanfaronas, ke Esperanto servas la pacon. Ĉu tio estas vera? Jes kaj ne. Dependas ĉiam de la sincereco de la homoj, kiuj uzas Esperanton. Nur naivuloj kredas, ke Esperanto povas eviti militon. Tutcerte, la spirito de la lingvo estas pacama, sed ni devas uzi tiun argumenton kun rezervemo kaj prudento, des pli ĉar la vorto „paco“ estas misuzata en la mondpolitiko.

La historio de nia movado ankaŭ montras, ke Esperanto kaj paco ne estas sinonimoj. Multe tro multaj disputoj, intrigoj kaj kvereloj okazis en niaj vicoj. La esperantistoj ne estas anĝeloj, sed homoj kun bonaj kaj malbonaj ecoj. Tamen ni klopodu esti toleremaj kaj komprenemaj, ĉar ni estas esperantistoj.

Mi havis la feliĉon transpreni la gvidadon de la Svisa Esperanto-Societo en bona ordo kaj harmonio. Tio estas ŝanco. Mi esperas, ke mi sukcesos eviti eventualajn internajn konfliktojn dum mia prezida periodo. Ni bezonas la pacon kaj la unuecon por disvastigi Esperanton.

Sed mi celas ankoraŭ pli altan harmonion. Ni ne devas nur kunekzisti, sed kunlabori, ĉiuj, eĉ se ni havas diversajn opiniojn. Mi ŝatus regajni ankaŭ tiujn elementojn, kiuj foriĝis por iu ajn motivo. Estas tute nature, ke en la Svisa Esperanto-Societo, kiu laŭstatute estas neŭtrala, spite regas diversaj tendencoj. Mi jam aliloke akcentis, ke kritiko estas necesa kaj saniga, ĉar la saĝo ne kuŝas nur en unu kapo. Ni respektu ĉies opinion. Aliflanke ni obeu la regulojn de la disciplino, sen kiuj nia movado ne povas evolui prospere.

La celoj de la Svisa Esperanto-Societo estas fiksitaj en la statuto. Tamen la societo havas ankaŭ nesribitajn devojn, kiuj estas same gravaj kiel la skribitaj. SES devas ludi la rolon de landa asocio kaj identas, mallonge dirite, kun la Esperanto-Movado en Svislando. Ni ne volas nei per tiu konstato la valoron de la lokaj kluboj kaj fakaj asocioj. Ili estas necesaj kaj utilaj. Sed SES havas apartan respondecon, specialan taskon: ĝi devas koordini la diversajn lokajn aŭ fakajn aktivecojn, helpi malfortajn grupojn kaj izolulojn, vekti dormantojn, puŝi pasivulojn, lanĉi novajn entreprenojn, kuraĝigi laculojn, kontakti aŭtoritatojn kaj ne-esperantistajn societojn ktp. ktp.

La Svisa Esperanto-Societo estas la forumo, kie centriĝas la fadenoj de ĉiuj grupestroj, asociestroj, gvidantoj kaj aktivuloj. Estas tempo unuigi la fortojn. La fakaj asocioj tute ne konkurencas la agadon de SES, male, ili pliriĉigas la esperantistan vivon. Forta kunlaboro estas necesa inter ĉiuj esperantistoj, inter fervojistoj, instruistoj, naturamikoj. Ni povas fruktodone helpi unuj la aliajn. Signo de tiu kunlaboro estis la regiona kunveno en Bellinzona, organizita grandparte de la esperantistaj fervojistoj en Tiĉino. En tiu senco kaj spirito SES subtenas aŭ mone aŭ morale la Tiĉinan Esperanto-Ligon, la Esperanto-Edukistaron de Svislando, la Esperanto-Junularon de Svislando, la entreprenon „Grajnoj en Vento“ kaj la feriosemajnojn Münchenwiler. Estonte ni devas ankoraŭ pli bone organizi la diversajn aktivecojn.

Se ni sekvos tiujn rekomendojn, nia movado aspektas pli forta, pli impresa, pli konvinka. Unuigi la fortojn estas mia arda deziro. Ni iru kun tiuj pensoj tra la Nova Jaro.

## Antologio XXX

### Tazio Carlevaro

Prezidanto de la Konsulta Komitato de CDELI

### **Pri la instruado de Esperanto (1974), pri svisa lingvopolitiko kaj pri politiko de Esperanto (1975)**

En: *Monata Cirkulero (KCE)*

#### *Enkonduko:*

Meze de la 1970aj jaroj en Svislando grupo de aktivuloj el Svisa Esperanto-Societo komencis agadi kun la celo konvinki la svisajn lerneajn instancojn ke estus tempo enkonduki Eon en la bazajn lernejojn, alternative aŭ paralele al nacilingvoj. Ĉi tiu grupo, kiu agadis kadre de la t.n. Svisa Esperanto-Lernejkomisiono, t.e. ekster la aktivecoj, kiuj estis lanĉitaj de Kultura Centro Esperantista (KCE) sub la titolo « L'espéranto à l'école » kun la celo serioze trakti la Eo-aferon kun la politikaj aŭtoritatoj, sendis al la instrudepartementoj, al gravaj pedagogiaj instancoj kaj al porinstruistaj periodaĵoj de Svislando Alvokon (*Aufruf an die Schweizerische Lehrerschaft*), kiu estis subskribita de la Centra Komitato de SES. En ĉi tiu alvoko tiuj e-istoj reagis al la rezolucio de EK/EDK (= Spertulo-komisiono de la Svisa Konferenco de estroj de edukdepartementoj), kiu reformulis la ĝis tiam validan svisan lingvopolitikon, proponante rifuzi ĝin por akcepti anstataŭe pozicion favoran al la tutsvisa enkonduko de Eo.

Tazio Carlevaro (\*1945), tiam 30-jara planlingvano, konsterniĝis pri la elpaŝo de tiu t.n. Svisa Eo-Lernejkomisiono, karakterizante ĝin komplete amatora kaj fantazia, kaj kuraĝis esprimi siajn vidpunktojn publike en la bulteno *Monata Cirkulero* de Kultura Centro Esperantista (KCE), n-roj 60/1974 kaj 64/1975. Antaŭ ĉio Carlevaro atentigis, ke la grupo ĉirkaŭ Heinrich Matzinger komplete miskomprenis kaj misinterpretis la rezolucion de EK/EDK, en kiu oni kredis esti malkovrinta kvazaŭ revoluciajn modifojn en la svisa lingvopolitiko rilate la preferon de la angla lingvo kaj rilate la instruadon de fremdlingvoj en la bazaj (aŭ elementaj) lernejoj. Laŭ Carlevaro tute ne temis pri revoluciaj ŝanĝoj en la svisa lingvopolitiko, sed male temis pri ĝia principa konservo, kiel ĝi validis dum la lastaj 150 jaroj ĝis nun.

Carlevaro montris sin ŝokita pro la argumentoj aŭ eraraj, aŭ sloganecaj, aŭ ne science pruvitaj, aŭ banalaj, aŭ nenion pruvantaj, kiujn la grupo submetis al la oficialaj instancoj. Laŭ li tiu alvoko estis ne nur groteska, stulta kaj danĝera por Eo mem, sed ankaŭ plene direktita kontraŭ la svisa lingvopolitiko. Feliĉe neniu oficialulo reagis kaj neniu faka periodaĵo aperigis tiun alvokon, kiun Carlevaro nomis simptoma por la fundamenta amatoreco en nia Eo-aktivo. Fakte la situacion tiam savis iu ne-esperantisto, nome Leonard Jost, ĉefredaktoro de la grava revuo *Schweizerische Lehrerzeitung*, per letero al Otto Walder, tiama prezidanto de SES. Jost atentigis lin, ke la afero estas politika, kaj ke ne eblas aperigi en tiu periodaĵo tekston, kiu kontraŭstaras per pseŭdosolvo la tutan ĝis nun validan lingvopolitikon, kiu ne estus realigebla en la venontaj jaroj pro ŝtatpolitikaj kialoj.

En *Monata Cirkulero* 60/1974 Carlevaro prezentis kelkajn esencajn sciencajn konsiderojn kaj metodologiajn kriteriojn de la profesia frutempa instruado al infanoj ĝenerale kaj de la instruado de Eo aparte. En *MC* 64/1975 sekvis lia fundamenta kritiko de la agadmaniero de tiu grupo de svisaj e-istoj, kiuj kompreneble tuj ekvidis en Carlevaro iun „kverelemulon”. Ĉi tiuj artikoloj trafte respegulas la argumentan etoson, kiu regis inter e-istoj de tiu periodo, kiuj evidente perdis la paciencon, pro tio ke eĉ post la UNESKO-rezolucio de la jaro 1954 Eo ankoraŭ atendadis sian deziratan enkondukon en la lernejoj kaj kiuj tial entreprenis trudan agadon tute malutilan kaj finfine sensencan.

*Originala teksto (en Esperanto):*

### **Kelkaj pripensoj koncernantaj la instruadon de Esperanto (1974)**

(*Monata Cirkulero / KCE*, n-ro 60, oktobro 1974)

#### Enkonduko

Plej bone pri pedagogiaj problemoj povas paroli pedagogoj kun vasta sperto en la instruado. Tamen, kaŭze de la socia graveco de la pedagogio, estu permesate ke ankaŭ ne-pedagogo (kvankam mi instruas Esperanton jam ekde du jaroj ĉe Mígnos kaj ekde same multe da tempo ankaŭ psikiatron kaj klinikan psikologion ĉe profesi-flegistinaj lernejoj) esprimu kelkajn observojn kaj opiniojn pri temo, kiu tuŝas nin esperantistojn en sufiĉe tikla punkto: nome pri la instruado de Esperanto en la elementaj lernejoj.

Kial ĝuste pri ĉi tiu temo?

Unu el la mitoj de la Esperanto-movado estas la instruado de Esperanto en la lernejoj, nome ankaŭ al la infanoj. Lastatempaj spertoj sub la aŭspicioj de ILEI (Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj) ŝajne evoluis positive, sed mi ne konas ilin. Do ne pri ili mi parolos. Sed tiu almenaŭ parte nova fenomeno, kiun evidentigas la agado de ILEI, ne restis senresponda en Svisio: grupo ĉirkaŭ la zurikaj instruistoj s-roj Vontobel kaj [Heinrich] Matzinger, kun la helpo kaj apogo de SES, komencis eklabori en tiu direkto. La afero, principe, estas salutinda. Sed sciante, ke miaj konoj estas limigitaj, mi decidis ampleksigi miajn sciojn pri la problemoj de instruado de lingvo al infanoj. Tial, preskaŭ hazarde, mi renkontiĝis kun dika libro; iaspeca itallingva biblio pri frua lingvo-instruado, kiun aŭtoris prof. d-ro R. Titone, fama itala psikolingvisto kaj pedagogo: ‘Bilinguismo precoce ed educazione bilingue’ (Romo, 1972), kiu resumas preskaŭ ĉiujn spertojn ĝis nun faritajn en Eŭropo kaj parte ankaŭ ekster Eŭropo. El tiu libro mi ĉerpis kelkajn ideojn, kiuj estas signifaj ankaŭ por la juninfana Esperanto-instruado, kaj ilin mi deziras prezenti al la Esperanta publiko, kiu aparte interesiĝas pri tiu problemoj.

#### Ĝeneralaj problemoj de infana bilinguismo

Unu el la plej tipaj aspektoj de la Esperanta movado estas la distrumpetado de la ekzisto de „denaskaj” esperantistoj (fakte: denaskaj kompetenculoj pri Esperanto kaj pri alia lingvo), sed ankaŭ la kompleta manko de detalaj studoj pri la fakta signifikeco de tiu denaska esperantisteco. Laŭ W.F. Mackey (‘The Description of Bilingualism’, aperinta en *Canadian Journal of Linguistics*, VII, 1962, 2, p. 53) oni devus analizi minimume la jenajn faktojn:

- a) Nivelo de perfekteco en la dulingva komportamento;

- b) Funkcioj kaj alternadoj de la du lingvoj;
- c) Studoj pri la interferoj strukturaj (gramatikaj, sintaksaj, leksikaj /semantikaj/ inter la du lingvoj, t.e. pri la psikolingvistikaj problemoj de la duobla kompetenco.

### Ĝeneralaj problemoj de frutempa lingvoinstruado

Antaŭ ol komenci eksperimenton, oni devus analizi la sukcesojn kaj malsukcesojn de la antaŭaj analogaj eksperimentoj. Tiu estas ĝenerala regulo, valida ne nur en pedagogio. Oni devus unue do ellabori (statistike) la kondiĉojn kaj la rezultojn de la iamaj spertoj pri fruinfana lingvoinstruado de Esperanto al divers-landaj infanoj.

Sed tia analizo devas enhavi ankaŭ ĝeneralajn konkludojn starigitajn sur la bazo de la tezoj ellaboritaj komence de la eksperimento: t.e. se oni faras eksperimenton, oni volas ion pruvi, kaj oni organizas la eksperimenton tiel, ke oni povas ellabori ĝin statistike je ĝia finiĝo.

Verŝajne la plej grava demando, kiun oni renkontas, estas la jena: „Kial instrui fremdlingvon tiel frue? Kaj kial /en nia kazo/ ĝuste Esperanton?” Eksperimento devas esti tiel konstruita, ke ĝi donu respondon konvinkivan [sic!] al tiuj demandoj.

En la starigo de la ekzamenataj faktoroj do estas konsiderendaj aparte faktoj koncernantaj la lingvodidaktikon, la lingvistikon, la pedagogion, la psikologion kaj la neŭrofiziologion.

La fama neŭrofiziologo Penfield, en ‘Speech and Brain Mechanism’ (1959), proponas la gravan koncepton de motivado en la lingvoinstruado, kiun li situigas ĉefe en la parola kreivemo kaj en la impulso al pli granda socialiĝo. Li cetere asertas, ke oni devas akurate analizi la efektojn de frutempa lingvoinstruado al la ĝenerala personeco de la infano, al ĝia inteligento-developo kaj al la sociaj valoroj: pri ili, cetere, la internacia literaturo ofte malkonkordas.

### Aliaj frutempaj lingvoinstruadoj

Laŭ mia opinio la esperantistoj devus akurate studi ankaŭ la ĝisnunajn eksperimentojn de frutempa lingvoinstruado, kiuj koncernas naciajn lingvojn. Ili ne estas sporadaj, kiel kelkaj el ni opinias. Titone, cit., p. 143, asertas, ke laŭ UNESKO-statistiko (farita en 45 landoj en 1962) en 32 landoj ekzistis programoj por lingvoinstruado al infanoj sub la deka jaraĝo. Nur ses landoj tute ne havis programojn tiurilatajn. Oni tiam povis konstati 19 kursojn pri angla, 13 pri franca, 4 pri rusa, 3 pri germana, 2 pri hispana lingvoj.

## Teknikaj problemoj de frutempa lingvoinstruado

Ĉiuj cititaj aŭtoroj (Titone, cit., p. 304-5) emfazas tri elementojn, kiuj ŝajnas esti esencaj en la frutempa lingvoinstruado:

A) Faktoroj koncernantaj la instruistojn: Laŭ Titone, la instruistoj devas bone koni la modernajn lingvistikajn teknikojn, esti bonaj spertuloj pri psikologio, kaj, ĉefe, perfekte scii la instruatan lingvon (p. 194). Ili devas esti ankaŭ bonegaj pedagogoj, ĉar dumlecione oni devas ofte „ŝanĝi registrojn”. Titone citas tekston de Peter Doyé, ‘Frühbeginn des Englischunterrichts’, Cornelsen Verlag, Berlino 1966, kiu postulas la jenajn kvalitojn ĉe tiaspecaj instruistoj:

- a) sperto en la instruado al infanoj;
- b) bonega kono aktiva kaj pasiva de la koncerna lingvo;
- c) kono aktiva kaj pasiva de la moderna didaktiko de la fremdlingva instruado;
- d) spertoj pri instruado de la koncerna lingvo al infanoj en la 5-a klaso;
- e) aktivi en la klaso kiel klas-instruistoj.

Laŭ Titone (cit., p. 252) eksperimento nepre fiaskas se

- a) oni ĝin preparis malbone kaj maldetale;
- b) la instruisto ne havas la postulatajn kvalifikojn;
- c) la instrumentado estas netaŭga;
- d) ĝi efektiviĝas sen iu ajn rilato kun la ceteraj instruataj fakoj.

Laŭ mi ĉi tiuj konsideroj de eminenta specialisto ŝetas problemigan lumon al lastatempe aŭdita opinio far la zurikaj Vontobel-grupestroj, ke „la instruisto povas instrui Esperanton kunlernante ĝin kun siaj disĉiploj”, kaj ke „iu ajn, kondiĉe ke li instruu Esperanton al infanoj ankaŭ eksterklaseje, povas membriĝi al la lanĉita eksperimento”. Laŭ mi ŝajnas vere, ke neniu specialisto povus konsenti kun tiaj esprimaĵoj.

B) Faktoroj koncernantaj la „medion” de frutempa lingvoinstruado: laŭ la supraj aludoj estas do klare, ke ne estas eble instrui al infanoj Esperanton sen ligi tiun instruadon kun la cetera lernejlaboro. Oni instruas Esperanton en lernejo, sed oni devas utiligi ĝin enlerneje (ankaŭ Penfield asertas ion tian). Gravas do instrui aliajn fakojn en la fremdlingvo.

C) Grava problemo estas la helprimedoj: la esperantistoj okupiĝis pri ili nesufiĉe profunde. Gravas la aŭdo-vidaj rimedoj (komparu tiurilate usonan eksperimenton de Johnson, Flores kaj Eleison: 'The Effects of Foreign Language Instruction on Basic Learning in Elementary Schools', aperinta en *Modern Language Journal*, 47, 1, 1963, p. 8-11), libroj, TV-programoj, filmoj, legaĵoj, ludoj. Titone detale priskribas tiujn helprimedojn, sed mi ne deziras sekvi lin, ĉar mi ne estas pedagogo.

#### Celoj de la frutempa lingvoinstruado

El la diversaj atingoceloj de gravaj programoj ĝisnun [sic!] ellaboritaj ni volas priskribi unu. Ĝi estas kanada, kaj nomiĝas Tan-Gau-metodo (Titone, cit., P. 159).

- a) Unua ŝtupo: aŭdo-kompreno (diskoj, filmoj, instruisto, TV, kantoj);
- b) Dua ŝtupo: interparolo (kongruaj respondoj al demandoj);
- c) Tria ŝtupo: libera parol-esprimiĝo;
- d) Kvara ŝtupo: vido-kompreno (legado);
- e) Kvina ŝtupo: laŭtvoĉa legado (kompreno lega + prononco)
- f) Sesa ŝtupo: gramatiko, ortografio, aktiva skribado, ekzercoj.

Tiel oni procedis en angla eksperimento en Leeds (Titone, cit., p. 191), kie, por atingi la cititajn celojn, oni uzis la jenajn rimedojn:

- a) parola „atako” de la lingvoinstruado;
- b) prezento de kompletaj segmentoj (frazoj aŭ signifaj propozicioj);
- c) uzo de aŭdvidaj rimedoj (filmoj, diapozitivaj, diskaj...);
- d) interesaj aktivaĵoj (ludoj, kantoj, dramigoj);
- e) uzo de la fremdlingvo en la instruado de historio, geografio, aritmetiko, poezio;
- f) klaslaborado pri kaj en la fremdlingvo (ne parolante tamen pri gramatiko)

Vi vidas do, ke la instruado al infanoj estas tre kompleksa afero, kiu postulas sciojn kaj longajn preparlaborojn, ankaŭ se la celoj aspektas modestaj. Oni neniel povas improviziĝi kiel pedagogo pri frutempa lingvoinstruado.

*[Sekvas ĉapitroj pri empiriaj spertoj rilate la problemon de la pretigo de la helprimedoj kaj la science metodikan testadon de la lernado]*

## Konkludo

Pluraj esperantistoj ne konscias pri la problemaro, kiun prezentas al la specialistoj (pedagogoj, psikologoj, lingvistoj) la frutempa lingvoinstruado. Pro tio estas facile troveblaj en niaj medioj „simplismaj” opinioj. Bedaŭrinde estas precize tiu simplismo, tiu amatoreco, kiu riskas fiaskigi Esperanton en la lernejoj: sed eble, post ĉi tiu artikolo, kelkaj interesataj homoj komencos interesiĝimpri la hodiaŭa disponebla bibliografio pri didaktiko kaj psikolingvistiko de frutempa lingvoinstruado, cel [sic!] eviti la faritajn erarojn kaj cel apliki jam certajn rezultojn kaj metodologiojn de instruado, de taksado kaj de materialpretigo al la frutempa instruado de Esperanto.

## **Svisa lingvopolitiko kaj politiko de Esperanto**

*(Monata Cirkulero / KCE, n-ro 64, aprilo 1975)*

Ni diru ion pri la antaŭfaktoj

Svisa Esperanto-Societo (SES) kaj grupo el instruistoj ĉirkaŭ s-ro Matzinger laboras jam ekde iom da tempo sur pedagogia kampo: kiel ĉiuj esperantistoj, ili strebas al tio, ke oni enkonduku Esperanton en la lernejojn. La unua agado estis la arigo ĉirkaŭ s-ro Vontobel de grupo el instruistoj, kiuj ŝatus instrui Esperanton al siaj lernantoj: tiu grupo asertis, ke oni povas instrui Esperanton ankaŭ ne sciante ĝin (t.e. kunlerni ĝin kun siaj lernantoj). La grupo ne ariĝis kaj la projekto ne povis efektiviĝi: en la numero 60-a de ĉiu tiu *Monata Cirkulero* mi eksplikis el teoria vidpunkto kial tio ne povis funkcii, kaj kial tio riskis transformi al katastrofa fiasko. Bedaŭrinde, anstataŭ malfermi diskuton pri miaj tezoj (pri kiuj mi asertas, ke ili fontus el objektiva scienca analizo de la problemo, kaj tute ne el ia kverelemo, kiun mi certe nek intencis nek esprimis en tiu artikolo), oni preferis silenti.... Kaj susuri, ke oni estas lacaj je ĉiamaj kritikantoj. Sed grupo sen celo mortas, do la grupo ĉirkau SES kaj s-ro Matzinger decidis novan agadon. Kaj oni decidis agadi kontraŭ la svisa lingvopolitiko. Sed nun, io pri la svisa lingvopolitiko.



Kio estas la svisa lingvopolitiko ?

Ĉiu lando havas lingvopolitikon. Tiu politiko povas esti genocido (kiel en Francio kaj en Hispanio), minoritataĝa por minoritataj kulturoj (kiel en Sovetunio), aŭ liberala kaj favora al la evoluo kaj florado de minoritataj grupoj. Ĉi lasta estas ekzemple la svisa lingvopolitiko dum la lastaj 150 jaroj. Tiu lingvopolitiko ne falis de la ĉielo aŭ fontis el la kapo de saĝulo; ĝi estas la rezulto de 150-jara developo de niaj politikaj institucioj, kaj, fine, historia kompromiso inter la multegaj fortoj sociaj, kulturaj kaj ekonomiaj (minoritataj kaj majoritataj), kiuj aktivas en Svislando.

Lastatempe la konferenco de la estroj de kantonaj departementoj de publika instruado decidis „ŝanĝi” ion esencan en la svisa lingvopolitiko: unue, oni volis establi la germanan kaj anglan pli profunden, due oni volis enkonduki la instruadon de la unua fremda lingvo jam en la elementan lernejon. Pri la dua celo, venkis tute prave la renoviga tendenco (kvankam la unuajn rezultojn videblajn svisa-skale ni vidos certe ne antaŭ 1990...). Pri la unua celo, venkis la tradicio de kompromiso: la angla ne fortikiĝis, la situacio de germana, franca, itala kiel fremdlingvoj por sviso restis sama, ĉio do restis kiel antaŭe. Certe, la komisiono enoficiĝinta (EK/EDK = Spertulo-komisiono de la konferenco de estroj de edukdepartementoj) ne povis deklari ke ĉio restos kiel antaŭe: en nia epoko ne licas diri „ni konservu”, oni nepre devas prezenti ion novan... ankaŭ se ĝi tute ne estas nova, sed estas remaĉaĵo de la iam malnova supo.

Ke la „revoluciaj” decidoj de la komisiono EK/EDK koncerne la unuan fremdlingvon estas nenio alia ol la poluro kaj orizo de la malnova politiko (kaj ne povis esti aliel: post 150-jara bona funkciado, kaj tiom bonaj rezultoj, tia politiko estas tamen konservinda), tion komprenis ĉiuj. Ne komprenis tion SES kaj grupo ĉirkaŭ s-ro Matzinger, kiuj kredis ke efektive io esenca ŝanĝiĝos.

Sur la bazo de tiu mistakso ili decidis starti novan kampanjon por Esperanto en la lernejojn.

La unua batalo (La alvoko)

La unua batalo estis teksto al vi ĉiuj konata: *Aufruf an die Schweizerische Lehrerschaft* (Alvoko), kie oni prezentas la rezolucion de la EK/EDK, kaj proponas rifuzi ĝin por akcepti anstataŭe pozicion favoran al la tutsvisa enkonduko de Esperanto. Sekvas preskaŭ dupaĝa fantascienca priskribo pri tio kio okazos al la povraj svisoj se la propono de EK/EDK akceptiĝos: la priskribo estas tiom pli groteska, se ni konscias, ke fakte tiu rezolucio nenion ŝanĝis: la situacio restos precize sama kiel nun. Instruisto aŭ lingvopolitikisto kiu ankaŭ nur supraĵe scias la situacion en Svislando ekvidus, ke ĉi tie io ne bone funkcias: kial rekudro de malnova situacio devus alkonduki tian katastrofan situacion ? Sed, kiel mi diris, ĉio fontas el riĉa fantazio de kelkaj bonvolemaj mistaksintoj.

Sekvas kelkaj konsideroj: de kie preni la tempon (3 horojn semajne), de kie la monon ? Kvazaŭ la enkonduko de Esperanto en la lernejojn (por kiu ni disponas nek pri taŭgaj instruistoj, nek pri taŭga didaktika materialo) kostus nenion...!

Konkludas la alvokon kelkaj sloganecaj punktoj, kiujn ni tamen unuope konsideru; ĉar ili estas simptomaj pri la fundamenta amatoreco en nia Esperanto-aktivado.

- a) Se ĉiuj svisaj lernantoj eklernus unue Esperanton, ili povus inter si rilati parole kaj skribe. Vere, sed mankas eksperimentoj science kondukitaĵoj pri tiu afero: nur atenta pruvo de tia aserto per kontrolitaj eksperimentoj povus esti akcepteblaj argumentoj por pedagogiaj (kaj politikaj) instancoj.
- b) La dua argumento, pri la neavantaĝigo de unuopa lingvogrupo en kazo de akcepto de neŭtrala lingvo, estas la ĉiama ŝablonaĵo.
- c) Tria punkto pri la facileco de Esperanto: neniuj sciencaj argumentoj citataj, neniuj bibliografiaj indikoj! En la okuloj de neesperantisto tia punkto aspektas pura pretendo sen pruvo.
- d) La pruvoj (famaj eksperimentoj en Finnlando kaj Britio) estas tie prezentitaj sen bibliografiaj indikoj. Cetere ili aĝas jam pli ol 20 jarojn, kaj mi forte dubas, ke ili estas faritaj laŭ hodiaŭaj postuloj de pedagogia scienco.
- e) La kvina punkto enhavas mikspoton. Jen ĝi en Esperanto-traduko: ĝi komentas sin mem!

„Ĉiu instruisto kapablos memlerni Esperanton. – Ekzistas sufiĉe da lingvoprogresigaj ebloj. Ekzistas instrumaterialo por progresantoj. Esperanto havas ampleksan literaturon, el tradukaĵoj kaj el originalaĵoj. Svisa Esperanto-Societo organizas tiel nomatajn regionajn renkontiĝojn: ĉe tia renkontiĝo instruisto povas lingve progresi. Krome unuopaj esperantistoj metas sin je dispono por helpi al instruisto en kazo de malfacilaĵoj. – Konfederacio, kantonoj kaj komunumoj devus elteni do nur minimumon el elspezoj.”

- f) La lasta punkto estas malnova gurditaĵo pri la antaŭdestineco de Svisio (kvarlingva! Patrio de Pestalozzi!) al la disvastigo de Esperanto.

Subskribis ĉi tiun alvokon la Centra Komitato de SES.

Komento pri la alvoko

Malofte estas legebla tia dokumento: bazita sur miskompreno (t.e. ke io fakte ŝanĝiĝis en la svisa lingvopolitiko) ĝi atakas ion defendindan kaj validan: la svisan lingvopolitikon, per argumentoj aŭ eraraj, aŭ sloganecaj, aŭ ne science pruvitaj, aŭ banalaj, aŭ nenionpruvantaj. Kaj tamen tia dokumento estis dissendita tra tuta Svisio al instrudepartementoj, al gravaj pedagogiaj instancoj kaj al porinstruistaj periodaĵoj.

## La reagoj al la alvoko

El-inter la esperantistaro, eble ankaŭ pro intelekta pigreco, malmultaj reagis. Cetere, estas ĉiam malagrable reagi, ĉar multaj „pacemaj” esperantistoj volonte uzas tiam la epiteton (kromnomon) „kverelemuloj”, ankaŭ se la kritikoj estas tute ĝustaj. Iuj ĉirkaŭ KCE kaj s-ro Olivier Tzaut reagis, sed ne multaj.

El-inter la celitaj instancoj – feliĉe neniu reagis. Laŭ mia scio, neniu respondis, kaj ĉefe neniu periodaĵo aperigis tiun alvokon. Estu ĉi tie publika danko al tiuj redaktoroj, kiuj montriĝis pli sinceraj amikoj de Esperanto ol kelkaj esperantistoj: se ili publikigintus la tekston, ili dronigintus nian movadon en kompromitigan marĉon de ridindeco.

Tamen iu respondis: s-ro Leonard Jost, ĉefredaktoro de la grava *Schweizerische Lehrerzeitung*, per letero al s-ro [Otto] Walder. Li tute prave atentigas ke la afero estas politika, kaj ke la propono por kunordigo de lingvoinstruado en Svisio fakte venis de Schweizerischer Lehrerverein (SLV). Do neblas ke en ĝia periodaĵo oni publikigu tekston, kiu igas duba la tutan ĝisnunan politikon lingvan... Kaj li aldonas ion gravan: Neformala informiĝo ĉe membroj de la Centra Komitato de SLV montris, ke oni ne kontraŭstarigu al la cetere jam tradiciaj vidpunktoj pri la svisa lingvopolitiko iun pseŭdosolvon, t.e. proponon bedaŭrinde nerealigeblan en la venontaj jaroj pro ŝtatpolitikaj kialoj.

Tiu teksto estis manskribita: la redaktoro volis amike kaj afable, sed insiste inviti ne plu fari tian mispaŝon.

## Errare humanum est, perseverare diabolicum

La unua fuŝo ne sufiĉas: dua fuŝo estis urĝe bezonata. Ĝin reprezentas letero, konceptita kiel respondo al la afabla letero de la vera amiko de Esperanto s-ro Jost, kiun subskribis s-ro Walder en la nomo de SES kaj s-ro Maŭrico De Sassi en la nomo de la Svisa Esperanto-Lernejo-Komisiono.

Tiu fuŝo konsistas el Wiedererwägungsgesuch (peto pri repropono) favor [sic!] la solvo prezentita en la Alvoko, por ke la redaktoro ĝin prezentu al la Centra Komitato de SLV!

La letero komenciĝas per formalaj konsideroj, preterglitas al ŝajnargumento (problemo de lingvaj partneroj en Svisio), al banala problemo (ĉu en Tiĉino estos do franca aŭ germana konsiderata kiel unua fremda lingvo?). Sekvas kategoriaca aserto: „Nia opinio estas, ke nia solvo (Esperanto-solvo) estas alternativa propono al la plano de EK/EDK... Ĝi certe havus multe malpli da kontraŭuloj ol la plano de EK/EDK, ĉar per ĝi neniu ricevas avantaĝojn kaj neniu malavantaĝojn”.

En tiu citaĵo aperas klare ke neniam en la historio de la svisa Esperanto-movado oni sukcesis kunmeti tiom multe da naivaĵoj, mistaksoj, politikaj fuŝaĵoj ol en tiu ĉi letero. Sed tio ne estas ĉio, bedaŭrinde. La kulmino sekvas nun.

Unue la subskribintoj informas s-ron Jost, ke ili postulas plenan publikigon de la Alvoko: Estu ĉi tie dirinde, ke s-ro Jost proponis kiel „kontentigeton” la publikigon de la lasta parto de la Alvoko (ĉar ĝi estas el ŝtatpolitika vidpunkto nedanĝera – ĝi estas nur naiva kaj malbone /nescience/ formulata. Ne: niaj Esperanto-ĉampionoj deziras puŝi la aferon ĝis la plena ridindiĝo kaj senkreditiĝo.

Kaj nun, *dulcis in fundo*, jen io kiun mi tradukas laŭvorte: „Permesu al ni ankoraŭ inviton: organizu (post la aperigo de nia alvoko) voĉdonadon inter la instruistaro de la mezlerneja nivelo (4-6-aj jaroj)! Se la rekte koncernatoj malakceptos Esperanton, tiam ni scias, ke ni alvenis tro frue kun nia propono.”

Tiu estas danĝeriga propono, kiu riskas malantaŭenpuŝi Esperanton! Imagu ke estu negativa decido (evidente: tio estas preskaŭ tute certa). Niaj malamikoj havus tiam armilon ĉiam pretan, ĉiam utiligeblan, por nenigi niajn klopodojn (ankaŭ se seriozajn) dum minimume 50 jaroj. Kaj tion kaŭzintus du esperantistoj!

Ĉi-foje ankaŭ ne s-ro Jost povis savi Esperanton: tuj post tiu letero, kiu postulis reprivatigon de la tuta lingvopolitika afero, SLV (Th. Richner) sendis sekan leteron al ambaŭ ĉampionoj, dirante ke nun estas tro malfrue, kaj la reprivatigo-postulo ne plu estas akceptebla. Feliĉe!

Kion ni lernas el tio ?

„Esperanto estas valora instrumento: ĝi sukcesis supervivi multajn malfacilaĵojn kaj tio, malgraŭ la esperantistoj.” Vere: s-ro Jost, neesperantisto, estis pli bona, pli diplomata, pli kapabla defendanto de la internacilingva ideo ol famaj esperantistoj, kiuj per nefakta argumentado, nekompreno pri fundamentaj faktoj de svisa lingvopolitiko, nenionscio pri pedagogiaj postuloj en lingvoinstruado, naiveco, blufado, riskis endanĝerigi la ĝisnunan situacion de Esperanto en Svislando, dronigante en la ridindecon niajn ĝisnunajn atingojn en la lernejoj (ekz. Berno, Ĝenevo, Neuchâtel) bonfide (ĉar temas pri sinceraj homoj, kiuj ne intence pretigis tian teruraĵon) ili montriĝis tamen objekte malamikoj de Esperanto, homoj kiuj subfosas ĝin.

Kial tia situacio povis esti: ĉar oni ĉiam forgesas, ke ne la funkcio kreas la specialistojn, sed la specialistoj kreas la funkciojn. En movado tiel amatoreca kiel la nia, la kontraŭo estas vera: se iu subite iĝas prezidanto de SES, pro tio li aŭtomate ĉion komprenas pri svisa lingvopolitiko aŭ pri pedagogio de fremdaj lingvoj.

Kontraŭ tia amatoreco, danĝera ludo por serioza movado, kontraŭ tiu strebado ĉiudirekten, ankaŭ tien, kie objekte oni ne povas multon helpi pro nescio aŭ nekompreno, mi akre protestas.

Sed ni lernas, konsekve, ion alian: Jam la romianoj havis proverbon, ĉe esperantistoj ne tre konatan: Sutor, ne ultra crepidam (ŝuisto, prilaboru viajn ŝuojn). Lasu fine la pedagogian kampon al la pedagogoj! Neniu improvizas sin kuracisto aŭ lokomotivestro: kial tro multaj esperantistoj naive improvizas sin pedagogoj – aŭ lingvopolitikistoj? Ni ĉesu foje esti danĝeraj fuŝuloj kaj amatoroj. Aŭ ni detruos tion, kion la veraj specialistoj jam ekkonstruis.

Sed nun, kion fari ?

Evidente la senprecedence naiva agado de SES kompromitis Esperanton en pedagogiaj medioj. Tion ni bone konsciu. Mi proponus agadon por savi tion, kio restas savebla, sur du niveloj: interne kaj ekstere je la esperantomovado [sic!].

Interne de la Esperanto-movado [sic!]: Grupoj regionaj, KCE, ILEI-sekcio, agadgrupo « L'espéranto à l'école », unuopuloj ktp. protestu akre kontraŭ tia fuŝaĵo kolosa organizita de eta grupo: SES-jarkunveno protestu kontraŭ danĝera uzo de la famo de honorinda asocio: mi scias, ke la koncernaj homoj agis bonfinde, mi estimas ilin persone, sed la eraroj estis tiel grandaj kaj la rezultoj tiel katastrofaj, ke oni tamen protestu laŭte kaj klare.

Ekster la Esperantomovado [sic!]: Oni povus antaŭvidi agadon akorde kun kulturaj organizaĵoj esperantistaj, grupoj el instruistoj, unuopaj signifohavaj pedagogoj esperantlingvaj, por ke ili publike distanciĝu disde Svisa Esperanto-Lernejkomisiono: por ke oni ne konfuzu « L'espéranto à l'école », KCE, ILEI ktp. kun tia ne-reprezenta grupo el amatoroj.

Refoje estus klare: Min puŝis al la skribo de tia artikolo ne malamo aŭ kverelemo, sed amo al Esperanto kaj amikeco por la homoj kiuj organizis tiun katastrofan agadon. Mi volintus silenti, sed post 18-jara esperantisteco tiu estas la plej granda fuŝaĵo kiun oni iam ajn faris en Svisio. Estas danĝere daŭrigi tian Esperanto-politikon: ĝi kondukos al la abismo post nelonge. Mia artikolo estu komprenata laŭ sia propra intenco: ĝi estas alarmkrio.

## ***Antologio XXXI***

### **Claude Gacond**

Direktoro de Kultura Centro Esperantista (KCE)

### **Survoje al la dua jarcento de Esperanto (1985)**

En: *Svisa Esperanto-Revuo*

#### *Enkonduko:*

Claude Gacond (\*1931), unu el la plej signifaj reprezentantoj de la planlingva kaj Eo-movadoj de Svislando, esprimis, okaze de la transiro de la Eo-movado al ĝia dua jarcento, jenajn centrajn tezojn: La pionira periodo de Eo finiĝis, la e-istoj eniras novan epokon, post la fiasko de la naturalisma skolo en planlingvistiko (Occidental, Interlingua ktp.) Eo venkis inter la planlingvoj kaj en la 'lingvo-batalo' restos verŝajne nur du kandidatoj: la angla kaj Eo.

Per trafaj frazoj Gacond, kiu estis direktoro de Kultura Centro Esperantista (KCE) ĝis 1991 kaj prezidanto de Svisa Esperanto-Societo inter 1986 kaj 1994, prezentis al la legantoj de *Svisa Esperanto-Revuo (SER)* la tiklan situacion de Eo sojle de ĝia centjariĝo en 1987, sen samtempe perdi la optimismon. La konkludoj de Gacond trovas siajn fontojn en la spirita heredaĵo ĉefe de Edmond Privat (1889-1962) kaj Pierre Bovet (1878-1965) kaj en la longaj spertoj de Gacond kiel organizanto de la Eo-movado kaj kiel interlingvisto, kiu kiel unu el malmultaj e-istoj havis praktikajn kaj fruktodonajn rilatojn kun reprezentantoj de aliaj planlingvaj sistemoj.

La sekva artikolo, kiu aperis en *Svisa Esperanto-Revuo*, majo 1985, respegulas la pensmanieron, kiu por tiu periodo estis karakteriza en vastaj Eo-medioj; oni provis klarigi al si la fenomenon de Eo kaj de la planlingva demando entute, en kontrasto kun la internacia triumfo de la angla lingvo. En kiu grado la defendantoj de la anglaj lingvo kaj civilizo faros ĉion eblan por malfruigi la konfrontadon Eo-anglan – jen demando esplorinda pli profunde.

#### *Originala teksto (en Esperanto):*

#### Finiĝas la pionira epoko

Pretiĝo al inda celebrado de la centjara jubileo de esperanto pli kaj pli ĝenerale karakterizas la esperanto-vivon. Por la esperanto-socio, kiel por ĉiu homgrupo, la transiro en novan jarcenton havas gravan psikologian signifon. La esperantistoj ekkonscias, ke por ilia lingvo 1987 ne nur markos la eniron en novan jarcenton, sed ankaŭ tre verŝajne en novan epokon. Konkludiĝas fakte la pionira periodo de esperanto, sed neniu scias, kiu adjektivo karakterizas la duan jarcenton.

Depende de la loko, kiun oni okupas en la movado, oni alvenas al tre malsimilaj konkludoj pri la situacio de esperanto. Junulo aganta en rapide kreskanta junulara asocio emas konsideri tro optimisme tiun ĉi situacion, dum membro de maljuniĝanta kaj pereanta grupo ne partoprenas tiun optimismon. Li scias, ke post dissolviĝa fazo ĉiu societo ofte ekkonas stagnajn periodojn. Estas fakto, ke en sama momento kaj eĉ en sama lando esperanto progresas en kelkaj medioj kaj regresas en aliaj. Ni ekzamenos la situacion en Svislando, provante kompreni la kaŭzojn de tiuj diferencoj.

### Treege malpotenca lingvo

Estas fakto, ke la baldaŭ centjara esperanto restas treege malpotenca lingvo, se oni komparas ĝin kun la lingvoj, kiujn ĝi provas alfronti. Esperanto nur dependas de la strebado de la esperantistoj, dum pri la defendo de la naciaj lingvoj, kiuj akiris privilegian statuson ĉe mondorganizaĵoj, okupiĝas la registaroj de potencaj landoj, organizaĵoj industriaj, turismaj, kulturaj, ktp. Vera giganto fariĝis la angla lingvo, dum esperanto estas nano. Sed konvinkitaj esperantistoj memoras, ke la eta Davido faligis la potencon Goljaton per tre simpla armilo.

### Evoluas la lingva situacio

Por kompreni, kiom ŝanĝiĝis la situacio de esperanto en unu jarcento, sufiĉas kompari la hodiaŭan poresperantan argumentadon kun tiu de la fino de la deknaŭa jarcento. Tiam oni havis la iluzion, ke la latina lingvo povus refariĝi internacia kultura lingvo almenaŭ por la okcidenta mondo, kaj la esperantistoj devis demonstracii, ke tio ne eblas. Estis malpli facile rebati la argumentojn de la volapukistoj. Esperanto estis nur lingvo-projekto apud aliaj projektoj, kiuj ne estis sen intereso: Volapük, Idiom Neutral tiam estis la plej signifaj.

Post la unua mondmilito Ligo de Nacioj debatis pri la uzo aŭ ne de planlingvo, kaj tiam esperanto havis du konkurantojn: Ido kaj Occidental. Oni prave sentis, ke la zamenhofa lingvo ne estis akirinta sufiĉan maturecon por fariĝi laborlingvo en mondorganizaĵo.

Tridek jarojn poste Unesko en sia montevidea asembleo, dankal la advokata talento de Ivo Lapenna (1909-1987), devis agnoski almenaŭ la kulturalan valoron de esperanto. Sed en 1954 oni oponis al esperanto la novan projekton Interlingua de IALA. Nun oni scias, ke la verko de Alexander Gode (1907-1970) estis bazita sur latinida centrismo science nepravigebla kaj sur filologia koncepto de lingvistiko, malmoderna rilate al la malkovroj de Ferdinand de Saussure (1857-1913) kaj ĉefe de la usona strukturisma skolo, kies ĉefverkisto estas Noam Chomsky (\*1928).

Hodiaŭ esperanto staras tute sola kiel planlingvo. Ĝiaj konkurantoj montriĝis projektoj nevivkapablaj. La interlingvistikaj esploroj ne naskas plu novajn lingvo-projektojn. Ili ĝenerale fortikigas la pozicion de esperanto, demonstrante interalie, ke ĝi povus ankaŭ konveni kiel perilo por la tradukmaŝinoj.

La nacilingva situacio ankaŭ multe evoluis en unu jarcento. Kiam esperanto naskiĝis, la franca lingvo estis konsiderata kiel „la lingvo de la diplomatio”. Sed ekde 1919 Ligo de Nacioj baziĝis sur la dulingvismo angla-franca, kaj kreskis la rolo de la angla lingvo, kiu fariĝis la ĉefa laborlingvo en la kvin- kaj poste ses-lingva Unuiĝinta Naciaro kaj en ties fakaj organizaĵoj. En 1945 estis tute normale, ke el tiuj kvin laborlingvoj de UN kvar estas eŭrop-devenaj: la angla, franca, hispana kaj rusa. Nur la ĉina reprezentis la neokcidentan mondon. Dum la nafto-krizo UN devis ekuzi la araban, kaj hodiaŭ oni sentas, ke la svahila devus havi lokon en plurlingva mondorganizaĵo.

Estas fakto, ke ju pli multiĝas la laborlingvoj ĉe UN kaj en la aliaj mondorganizaĵoj aŭ en la kontinentaj naciaroj, ne nur kreskas la traduk-elspezoj, sed ankaŭ la potenco de la angla lingvo. Tiu ĉi idiomo fariĝis la efektiva mondlingvo en la fino de la dudeka jarcento. Tio estas ne nur konstatebla en la diplomataj interŝanĝoj, sed ankaŭ en la aktivecoj komercaj, turismaj, sciencaj, teknikaj, ktp.

#### Du kandidatoj

La situacio fakte ege simpliĝis, eĉ se la lingvo-nombro ĉe UN kreskas. Estas fakte du kandidatoj por la rolo de mondlingvo: *la angla kaj esperanto*. Kiel ni jam diris, la angla havas potencajn defendantojn, dum al esperanto mankas la prestiĝo.

La interlingvistikaj esploroj nun tendencas demonstri, ke se ambaŭ kandidataj lingvoj troviĝas en situacio de egaleco de la ŝancoj, nepre venkas esperanto, kiu estas pli taŭge adaptita por ludi la rolon de internacia helplingvo. Nur imagu ekzemple egalecon de la ŝancoj inter la angla kaj esperanto en la lernejoj: saman nombron da instruhoroj, saman valoron por la ekzamenoj, ktp. Tre rapide en la horaro dediĉita al esperanto oni povus entrepreni originalajn studojn, kies programoj estus tutmondaj. Imagu ekzemple egalecon de la ŝancoj en mondorganizaĵoj: la esperanto-utiligantoj ne bezonus plu la traduk-servojn, kiuj ĉiam akompanas la uzon de la angla fare de fremdparolantoj.

En kiu ajn fako tiu egaleco de la ŝancoj profitos al esperanto kaj malprofitos al la angla. Pro tio oni komprenas, ke la defendantoj de la angla faros ĉion eblan por malfruigi la konfrontadon esperanto-anglan. Tamen ni devas nin pretigi al tiu batalo, kvankam ĝi ankoraŭ tre foras.

La naciistoj – kaj tiaj ni pli malpli ĉiuj estas – longe preferos la lingvo-kaoson, kiu pludaŭrigas la ĝeneralan internacian kaoson, al iu ajn esperanto-eksperimento, kiu portus en si la ĝermojn de tutmonda sinteno.

Al la homo homa oni preferas la homojn ŝovinistajn. Ŝajnas pli komforte vivi en eterne militanta mondo, ol en transformiĝanta socio ema al supernaciismo.



## ***Antologio XXXII***

### **Arthur Baur**

Prezidanto de Svisa Esperanto-Societo

### **Obstakloj kontraŭ la internacia lingvo (1986)**

En: *Svisa Esperanto-Revuo*

#### *Enkonduko:*

La ĉefa eldiro de Arthur Baur (\*1915), signifa svisa ĵurnalisto kaj grava e-tisto, en lia kontribuo (*SER* 1/1986) al la diskuto okaze de la centjariĝo de Eo en 1987 estis, ke nek la gramatiko de Eo, nek la supersignoj de la Eo-alfabeto kulpas pro ĝia neakcepto kaj neenkonduko en la mondo. Ankaŭ la eventuala negativa sinteno de la tradukistoj aŭ la enormaj sumoj elspezataj por la tradukado ne estus la problemo.

Baur vidis la kialojn krom en politikaj konsideroj ankaŭ en la kontraŭstaro flanke de la mondaj elituloj, precipe de tiuj de la malpli grandaj nacioj. Fakte la reprezentantoj de la grandaj nacioj - angla, franca, hispana kaj rusa - ludas laŭ Baur la ĉefan rolon. La reprezentantoj de la germana, portugala, araba kaj ĉina lingvoj ĵaluzus la grandajn potencojn kaj volus atingi, ke ankaŭ iliaj lingvoj akiru la saman statuson. La celo de la apartenantoj de tiuj lingvoj estus, ke ili povu uzi ilin senĝene kaj ke la tradukistoj ĉiam estu je ilia dispono. Sekve neniu de tiuj reprezentantoj dezirus, ke ilia lingvo estas anstataŭita de neŭtrala universala lingvo kiel Eo.

La dua konsidero de Baur koncernas la sintenon de la elituloj. Temas do pri homoj, kiuj reprezentas la naciojn sur la diplomatia parkedo. Ili trairis bonajn lernejojn, ĝuis longan profesion formadon kaj majstras unu aŭ plurajn el la tiel nomataj grandaj lingvoj. Persone ili ne sentas la malavantaĝojn de la nuna lingva ordo, male ĝi eĉ estas bonvena al ili. Per la scipovo de grava nacilingvo ili povas ludi internacian rolon, per kiu ili povas distingi sin de siaj samlandanoj, kiuj ne apartenas al tiu elito kaj ne disponas pri iliaj lingvaj konoj. Per la ekuzado de Eo, kiu signifas pli demokratian lingvosolvon por pli vastaj tavoloj, tiuj elituloj perdus sian monopolon kaj siajn privilegiojn. Ĝuste tial tiu elito ne havus la privatan intereson, ke lingvo kiel Eo sukcesu.

#### *Originala teksto (en Esperanto):*

La jubileo de esperanto, kiu aktualiĝos en la proksima jaro, certe estos okazo por multe paroli pri esperanto kaj atentigi la publikon pri la fakto, ke ĝi fariĝis centjara. Tio parte estas bonvena, sed parte ankaŭ tikla. Ni renkontos en la publiko la rimarkon: „Ĉu vere esperanto jam estas centjara, kaj ankoraŭ ĝi ne estas ĝenerala akceptita? Kio estas la kaŭzo?” Tiun demandon ni aŭdos ankaŭ flanke de personoj, kiuj tute

simpatias kun la ideo de esperanto, ni aŭdos ĝin eĉ de aktivaj esperantistoj mem. Ni do estas devigataj serioze okupiĝi pri ĝi.

Evidente ni povas eldiri la malnovajn kaj cetere ĝustajn observojn, ke cent jaroj ne estas multo por la realigo de ideo. La kristanismo bezonis post la morto de Jesuo 282 jarojn, ĝis ĝi estis oficiale rekonata. Kiel alia, sed tamen komprenebla fakto prezentiĝas la observo, ke la internacia konvencio pri la enkondukado de la normigitaj decimaligitaj mezuroj (metro, kilogramo, litro ktp.) datumas el la jaro 1875, kaj eĉ hodiaŭ ĝi estas ne mondscale efektivigita (pensu pri Britujo) ! Tamen tiu argumentado ne estas sufiĉa.

Ĉu eble la kaŭzoj pri la malsukceso de esperanto estas la lingvo mem? Eble la komplikeco de ĝia gramatiko aŭ la manko de ĉapelumitaj literoj en la presejoj? Tiu demando estas senfunda. La gramatiko de esperanto tamen estas relative, t.e. en komparado kun la naciaj lingvoj, facila, kaj la multaj akceptoj de la franca ortografio (pli multnombraj ol la ĉirkumfleksoj en esperanto) tute ne malhelpis, ke la franca lingvo dum ducent jaroj fakte ludis la rolon de mondlingvo. En kazo de bezono la presejoj tre rapide havigas al si la necesajn literojn. La kvalito de esperanto kiel fleksebla kaj esprimriĉa lingvo multfoje estas pruvita en la esperantistaj kongresoj kaj en ĝia literaturo. Tiun aspekton de la tuta afero ni do povas flankenlasi.

La kaŭzo, kiu laŭ mia persona opinio estas ĉefa, koncernas la politikon. En la granda politiko, do en la diplomatio, en la internaciaj organizoj kiel UN, WHO, UNESKO, FAO, EFTA, EG ktp. la reprezentantoj de la grandaj nacioj ludas la ĉefan rolon; iliaj lingvoj estas la angla, franca, hispana kaj rusa. Ili povas uzi ilin senĝene; ĉiam estas je ilia dispono la tradukistoj, kiuj devas traduki ĉion ajn, kion ili eldiras, en la aliajn lingvojn. En la dua vico staras la anoj de la germana, portugala, araba kaj ĉina lingvoj. Ilia celo estas havigi al siaj lingvoj la saman statuson, kiun jam havas la unue nomitaj kvar lingvoj. Ĉi tio estas ilia deziro kaj ne la anstataŭigo de iliaj propraj idiomoj per neŭtrala lingvo.

Nun, la proksima paŝo en tiu analizo estas la argumento, ke la malgrandaj nacioj, kies reprezentantoj neniam povas esperi, ke iliaj lingvoj estos uzataj sur internacia nivelo, devus konvinkite kaj kun energio batali por egalrajteco; tiu ja nur estas efektivebla sur neŭtrala lingva fundamento. Kvankam ili ne havas la potencon de la granduloj, ili povus venki danke al sia pli granda nombro. Jen, ni atingis la plej malfacile klarigeblan aspekton en la tuta afero. Mi alvenis al jena konkludo: La personoj, kiuj reprezentas la malgrandajn naciojn sur la diplomatia parkedo, estas elito, kiu trairinte bonajn lernejojn kaj ĝuinte longan profesion formadon ja majstras unu aŭ plurajn el la tiel nomataj grandaj lingvoj. Persone, do individue, ili ne sentas la malavantaĝojn de la nuna sistemo; kontraŭe, ĝi eĉ estas bonvena al ili. Danke al sia lingva lerteco ili povas ludi internacian rolon, per kiu ili povas distingi sin de siaj samlandanoj, kiuj ne apartenas al tiu elito. En la kazo, ke esperanto estus ĝenerale akceptita kaj uzata, ili perdus sian kvazaŭan monopolon. Per tio ja la vojo al internacia rolo malfermiĝus al iu ajn. En ĉi tiu situacio ekzakte la samaj personoj, kiuj devus batali por la enkonduko de internacia lingvo, estas la samaj, kiuj tute ne havas privatan intereson, ke tiu lingvo sukcesu. Povas esti, ke mi eraras kaj ke mi malbone interpretas la staton de la aferoj, sed ĝis nun mi trovis neniun fakton, kiu malpravigus mian argumentadon.

Oni ankaŭ jam pensis, ke kulpas la profesiaj tradukistoj pri la neakcepto de internacia lingvo, sed mi ne kredas tion, malgraŭ ke oni jam povas supozi profesion intereson ĉe ili por kontraŭstari la enkondukon de internacia lingvo. Oni tamen konsideru, ke ili ne havas decidrajton en tiaj aferoj kaj maksimume povas iomete influu la iradon de la aferoj.

Oni ankaŭ jam pensis, ke la fakto de la enormaj sumoj malŝparataj daŭre por la traduka servo en internaciaj organizoj – plej frape en la eŭropa komunado – devus havi pozitivan instigan influon por la akcepto de internacia lingvo. Sed la fakto, ke la registaroj elspezas absolute frenezajn sumojn por la armado, estas unu el la diversaj pruvoj, ke la mono en la vivo de la ŝtatoj ludas malpli da rolo, ol privatuloj pensus juĝante laŭ sia propra malgranda mastrumado. La lingva situacio sur la internacia nivelo estas frapa pruvo por la ĝusteco de nia malnova proverbo: Warum einfach, wenn es kompliziert auch geht? (Kial simpligi ion, kio komplike funkcias?).

Mi ne pretendas, ke mi havas la sole ĝustan respondon al la demando formulita en la supra titolo. Eble iu sentas sin provokita doni alian respondon, taŭgan por publikigo.

**Rudi Hauger**

Ĝenerala sekretario de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)

## **Danĝera lingvo, sed ne danĝera movado (1992)**

En: *Scienca Revuo*

*Enkonduko:*

La suba teksto estas eltiraĵo el la atentinda artikolo de la iama ĝenerala sekretario de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) Rudi Hauger, „Lingvo sub la sankta signo de l’espero“. Ĝi estis publikigita en *Scienca Revuo*, vol. 43(1992)(1)-160, p. 82-91. La germano Hauger vivas en Svislando kaj estas konata al la partoprenantoj de la Universala Kongreso kiel fakpreleganto dum la kongresa universitato.

Laŭ Hauger la situacio por la lingvo kaj movado Eo esence ŝanĝiĝus, se la ‘fina venko’ efektiviĝus. Verŝajne iuj profitantoj gajnus, dum multaj e-istoj, evidente tro bonintencaj, por ne diri naivaj, supozeble perdus.

Sed la ĉefa demando ne estus la konsekvencoj de la fina venko de Eo, sed la esenca demando konsistas en tio: kial kaj por kiu Eo povus esti interesa. Ideologie kaj sociologie, Eo kaj ĝia movado estas en principo sufiĉe kompleksa fenomeno de konglomeraĵo de plej diversaj tendencoj, kaj la e-istaro ne sufiĉe eluzas sian potencialon en eksteraj rilatoj.

Ĉar la ‘ekstera mondo’ ne atentis Esperantion, la ekzistado kiel e-isto konsistis ĝis nun grandparte el pura frustracio, kaj preskaŭ ĉiu konscia e-isto suferas sub tiu kondiĉo. Sed laŭ Hauger ne kulpas ‘eksteraj kriterioj’ kiel ekzemple la du mondmilitoj aŭ la kredo, ke Eo estas aŭ povus esti ‘danĝera’ lingvo aŭ movado. La ĉefaj kialoj por tiu stagnado laŭ la aŭtoro devas esti serĉataj en la interno de la movado mem. Hauger konkludas, ke „la burĝa socio, en kiu Eo grandparte estas disvastigata, ne kapablas aŭ ne ŝajnas interesiĝi pri pli granda internacieco“ de Eo. Do ĉefe la etburĝa idealismo de la e-istaro, kiu estas kontenta pri si mem kaj kiu timas ĉian eksteran malfermiĝon, la manko de propra elito, la izoliteco kaj la sekteca karaktero de la movado havus malhelpajn efikojn al ĉia vera internaciismo. En sia drasta analizo Hauger montras tiujn problemojn laŭ la ekzemplo de sia propra organizo ISAE, en kiu li estis ĝenerala sekretario kaj redaktoro.

Se Esperantio volus esti atentata de la ekstera publiko, ĝi devus formi unue sian eliton, ne nur lingvan, kaj zorgi, por ke internaj Eo-novaĵoj fariĝu ankaŭ ekstere signifaj. Krom tio devus esti formitaj veraj fakuloj. La muro, kiu ĉirkaŭas Esperantion, ĉu memkaŭzita aŭ konstruita de alia, devas unue esti trarompita. Se la e-istoj ne sukcesas en tio ekzistos la reala danĝero, ke iliaj ideoj vaniĝas.

*Originala teksto (en Esperanto):*

Esperantistoj ne estas unuavice profitantoj. Se Esperanto venkus, verŝajne tute aliaj personoj ol la hodiaŭaj uzantoj estus la profitantoj, instaligus tre diversaj interesatoj kaj tirus profiton el mondvaste disvastigita helplingvo. La hodiaŭa esperantistaro kun sia etburĝa strukturo kaj internaj diferencoj ne adaptiĝus al la bezonaĵoj de mondvasta disvastigado. Supozeble la kvereloj de diversaj graveguloj kaŭzus interesrilatan kaoson inter la ambiciaj profesiaj kaj malprofesiaj premgrupuloj de tiu mondlingvo. Ni rigardu ekzemple en la disfalinta GDR la hodiaŭan nulan rolon de la instigitaj idealistoj. Ankaŭ la esperantistaro ofte reprezentigas kvazaŭ eklezia unuiĝo de kredantoj, en kiu ĉiu kredas esti la pli ver(d)a kredanto.

Sed ĉi tie ni feliĉe ne devas pritrakti la eventon de la fina venko, sed pli bazajn praktikajn realaĵojn. La kondiĉoj de la hodiaŭa kadro postulas, ke ni racie disponu pri la malmultaj fortoj; ni estu pretaj kunlabori kun tiuj progresemoj, kiuj komprenas progreson kiel plialtigon aŭ minimume stabiligon de la vivkvalito, sed ne kun aliaj, kiuj komprenas progreson nur kiel kvantan laŭ ekonomio, kapitalo aŭ kosto. Tamen, nia okupo pri tiu bona intenco ne povas sufiĉi el tute praktikaj vidpunktoj, ĉar Esperantio kaj ankaŭ ISAE ne povas vivi per tio, ke ĝi produktas ion, kio estas farita en la lingvo Esperanto, se la produkto ne estas tia, ke iu pretas aĉeti ĝin pro jenaj kaŭzoj:

- a. pure lingva intereso,
- b. aktiva intereso pri enhava informo,
- c. pasiva intereso pro asocia membreco,
- ĉ. intereso kiel kredanto aŭ kredulo de la Esperanto-ideologio.

Kion signifas Esperanto?

Efektive ekzistas problemoj ĉe la uzo de la vorto Esperanto, kiu povas signifi:

1. la pura internacia (help)lingvo Esperanto, de AIS nomita „Ilo“, intereso ligita ofte kun lingvistika priokupo;
2. la fakto uzi tiun lingvon kiel informilon, farado de multaj esperantistoj, intereso ligita ofte kun esperantologia priokupo;
3. la movademo, kiu propagandas la aplikon, ekzemple por ĝenerala faka agado (kiel la agado de ISAE laŭ statuto), plue la apliko, kiun celas UEA kaj konkurencaj asocioj, intereso ligita ofte kun la intenco de eksterfaka prestiĝo;
4. la interna ideo ĉe apliko de la lingvo, en la formo ekzemple de hilelismo, esperantismo, homaranismo, ideologia mondkoncepta komuneco;

5. la gramatika subjekto, kiu estas en la stato de espero iĝi agnoskota kiel internacia lingvo.

Fakte „Esperanto“ signifas kompleksojn de nocioj, dum ke „esperanto“ estas „nur“ lingvo; funkcioj 1-4 estas signifkatoj, 5 estas signifkanto.

Memkompreneble estas miksaĵo de la diversaj priokupoj, kaj pro malprecizaj difinoj restas multaj diskutoblecoj. Tamen estas ofte duba, laŭ kiuj kriterioj ĉiu unuopulo decidas en tutsimplaj ĉiutagaj decidoj.

Kiel interesato, koncernato kaj trafato mi mem interesiĝus ekzemple pri motivoj de niaj membroj kaj eĉ de ĉiuj esperantistoj, ĉar kiel ĝenerala sekretario mi memkompreneble intencas vivteni ISAE kaj *Sciencan Revuon* por ĉiuj celoj kaj eble ankaŭ por eventuala pli posta rolo, ĉar la aktuala stato ne povas esti la fina celo.

La pura esperantismo tamen al mi ŝajnas plie ideologio, kiu helpe de elcerba kreitaĵo nur konstruas novan muron. Necesas do emfazi, ke Esperanto povas esti danĝera lingvo, sed certe ne estas danĝera movado! Esperanto estas eble kontraŭnaciisma sed tamen aŭtoritatema movado kun etburĝa karaktero, kun certa tendenco al mondcivitanejo, sed sen iu politika signifo aŭ nur tendenco, nur kun la instigo al ŝanĝo de lingvaj hegemonioj. Tio memkompreneble ne estas riproĉo, tamen estas klara konstato. Esperanto pretas pro tio trakti kun tre diversaj ekonomiaj kaj politikaj sistemoj, se nur la helplingva intenco estas tolerata. Aliaj ambicioj ekzistas nur en specifaj suborganizoj. Pro tio Esperanto ĝenerale ja ankaŭ ne batalas (eĉ ne pace!) por la programa celo, sed estas tre dankema pri ĉiu ŝtata aŭ interŝtata rekono, se ĝi nur efektiviĝas!

Ĝi jam travivis centkvinjaran periodon de bedaŭrinda frustrado en esperanta sindediĉo. Ni bedaŭrinde ĉiuj suferas sub tiu kondiĉo kun pli-malpli humoro pri la ne pli efektiva funkciado. Sed kiuj estas la kaŭzoj? Ĉefkaŭzoj estas certe ne la du mondmilitoj, kiujn oni ofte citas, ĉar intertempe ni havis en Mez-Eŭropo 45-jaran pacan periodon.

La kaŭzoj do devas ekzisti plie en la movado mem, ĉar estas strange, ke tia praktika ideo de internacia helplingvo ne povas gajni pli sukcesan signifon. La burĝa socio, en kiu Esperanto grandparte estas disvastigata, ne kapablas aŭ ne ŝajnas interesiĝi pri pli granda internacieco.

Kontraŭe, oni spertas, ke la mencio de la nomo Esperanto renkontas ne difinitan, sed tamen kontraŭan sintenon, kaj denove necesas demandi sin, kial tia inteligenta ideo ne provokas spontanegan subtenon tute kontraŭe al multaj banalaj novaĵoj, kiuj ĉiutage triumfis sur la kampoj de la tekniko (armiloj), nutrado, sano, ekologio, aŭ, ekzemple, la modo.

La kaŭzo certe ne estas la „danĝereco“ de la lingvo. Ke Esperanto povas esti danĝera lingvo ne estas dubinde, sed ĝi estas verŝajne sendanĝerigita per la sociologia medio kaj per la etburĝa idealismo de la uzantoj; ene de Esperanto fakte ne ekzistas alia avangardo ol lingva, kaj tio ne sufiĉas al internaciismo; esperantlingva informo restas enasocia informo, pri kiu ekstere de Esperantio neniu interesiĝas.

Pri eventualaj, eĉ gravaj eblaj novaĵoj ĉe aŭ per apliko de la Esperanto-lingvo mankas ĉiu multiplikiga publika efiko; ŝajnas ke eblaj modelaj novaj ideoj ne povas superi la partikularisman diversecon de la

movado kaj pro tio ne povas evoluiĝi publike; jam tiaj komencoj malsukcesas pro la sekteco de la movadetoj kaj pro manko de ĉiu forto al efektiviĝo.

Se mankas certa kritika grandeco laŭ kvanto kaj laŭ kvalito nova ideo ne sukcesas movi ion, sed vaniĝas.

Ekzistas eĉ ne unu profesie farita gazeto aŭ ĵurnalo, nur tajpitaj aŭ presitaj aglomeraĵoj de bagatelaĵoj, kiuj povas travivi surbaze de la membrotizoj, sed kiuj ne povas ekzisti pro serĉata aŭ kreskata signifo. Mankas longdaŭra regule aperanta sciencnivela ĵurnalo kun internacia agnosko, mankas Esperanto-ĵurnalismo; anstataŭ tio ekzistas granda nombro de konkurencaj, kelkfoje fuŝaj publikaĵoj (cetere, inkluzive *Sciencan Revuon!*).

Kvankam Esperanto vivas nur en niĉo, fondiĝas ĉiam novaj klubaj movadetoj (eĉ se kelkaj superflujaj malaperas), sed la konstanta substanco per tio ja ne plimultiĝas, sed nur etendiĝas estiĝante pli supraĵa. Tiu malgranda sentumo ankaŭ rilatas al ISAE, kvankam tiu ŝajnas nun pli stabila ol antaŭ kelkaj jaroj, sed preskaŭ estas ridinde, ke por tio necesis tiom da laboro flanke de la kasisto, ĉar ekzistneceso devus esti memkompreneblaĵo. Sed ĉu ISAE vere necesas? Restas do klasika demando: „kion fari?“, do la demando pri legitima programo. Ankaŭ mi ne scias kiel kion ŝanĝi, sed se la membroj ne interesiĝas pri aŭ ne estas pretaj al ŝanĝoj, la plulaboro ne plu havas sencon.

Ne rajtas esti io „bona“ nur pro tio, ke estas skribita en Esperanto aŭ farita nome de Esperanto. Tiu memtroestimo en Esperantio devas malaperi, ni ankaŭ zorgu, ke ĝi en ISAE malaperu. Necesas forumo kun celoj, ne kun babilaĵoj; necesas sciencistoj, teknikistoj, ekonomikistoj, ĵurnalistoj, kiuj havu pretecon kaj kapablecon per membriĝo influi la evoluon en ISAE, kiuj pretas senmaskigi la internacian blufon en scienco kaj politiko anstataŭ kunmiksi, kiuj ne estas aŭtoritatkredemuloj, sed kritikaj mempensantoj.

Ni devas esti pretaj ankaŭ al publikigado de ĉiu alia opinio, se ĝi povas kontribui al pluekzistado de sciencrilata praktika agado de ISAE, ekzempla ideo estas tiu pri fakaj studlibroj, sed, bonvolu, surbaze de realigeblaj kondiĉoj.

Slogano pri falantaj muroj de miljaroj malinteresas kaj estas ridinda himna frazaĵo, kiel ili ekzistas en preskaŭ ĉiuj naciaj himnoj. Jes, kelkaj muroj falas, sed aliaj ekestas, ekzemple en kapoj de la homoj, kiel la grandaj murodisfaloj estas sekvataj de arkaikaj militoj. Nia problemo do ŝajnas esti muro, kiu ĉirkaŭas Esperantion, ĉu memkaŭzita aŭ farita de alia; tiu muro eble estas ideologia aŭ minimume idealisma, malhelpas ekkoni la realajn obstaklojn, el kiuj aliaj interesoj profitas.